

ISSN 0984 7626

evangeliaj kalendaroj

internacia kristana revuo en Esperanto

LA SANKTA SPIRITO

8

1991

EVANGELIAJ KAJEROJ

internacia kristana revuo en Esperanto

Ni daŭre serĉas kunlaborantojn. Se vi deziras kunlabori, vi povas peti instrukciojn. La artikoloj estas petataj, sed vi povas libere sendi mallongajn kontribuaĵojn, recenzojn, noticojn, kiuj iel rilatas al la temo. Vi ankaŭ povas fari intervjuojn, poste tradukitajn.

La aŭtoroj respondecas pri la enhavo de la propra artikolo.

Redakcio, administracio : Philippe Cousson, 26 Rue de Pré Ventenet, F-86340 Nouaillé Maupertuis, Francio ; tel. 49 46 80 21, el eksterlande 33 + 49 46 80 21.

Directeur de la publication : M. Philippe Cousson.

Dépôt légal : juillet 1991.

Editeur : Philippe Cousson, Nouaillé-Maupertuis.

Imprimé par Michel Brun SARL, Poitiers (12 rue des Frères Lumière, Beaulieu, BP 252, 86006 Poitiers Cedex).

Redaktora bileto

La Sankta Spirito, temo kiu revenas en diskuto ene de la eklezioj. Juse, oni parolis pri la Sankta Spirito en Canberra (Aŭstralio). Sed mi bedaŭras ke, se iu esperantisto ĉeestis la konferencon, mi tute ne sciis pri li, kaj sekve, nek por *Dia Regno*, nek por *Evangeliaj Kajeroj*, mi povis havi raporton el la propra orelo.

Por ĉi tiu numero, same kiel por la baldaŭa, mi ricevis nur malmultajn respondojn por artikoloj. Kie do estas la kompententaj kristanaj esperantistoj? Eĉ, ĉu mi aŭdacus la demandon: Ĉu ekzistas kristanaj esperantistoj je instancaj aŭ teologiaj postenoj? Kaj se ne, kion ni esperantistaj kristanoj faras? Aŭ, kial ni restas ĉi tie, farante kvazaŭ nenion. Ĉu nia lingvo ne estas mirinda ilo!?

Per tiuj rimarkoj, mi flankeniris el la temo (Ĉu vere?). Krom temo, la Sankta Spirito estas ankaŭ, almenaŭ laŭ la kredo de multaj, la tria persono de la Triunuo. Li estas tiu, kiu parolas pri Jesuo-Kristo. Li estas tiu, kiu konvinkas pri peko. Li estas tiu, kiu akompanas la vivon de la kristanoj. Li estas tiu, kiu donacas, laŭ la bezonoj de la disĉiploj, ankoraŭ nuntempe.

En tiu numero, vi trovos artikolojn, kiel kutime el tre diversaj niveloj, originoj, longoj. Mia deziro estas, ke ili helpu vin konstrui vian propran penson, malferminte viajn kristanajn horizontojn.

LA SPIRITO EN LA EKLEZIO

Kiam oni priparolis eklezian unuiĝon en Suda Hindio, fama episkopo deklaris,

«Ni konsideradas unuiĝon de tiuj, kiuj rigardas la Eklezion kiel "la korpon de Kristo", kun tiuj, kiuj rigardas ĝin kiel "la komunumon de la fideluloj". Ne forgesu tiujn, kies koncepto de la Eklezio estas "la kunuleco de la Spirito". Sen ili la korpo, aŭ la komunumo, povas ŝajni morta.»

En la Unuiĝinta Eklezio de Suda Hindio estas anglikanoj kaj presbiterianoj, sed ne penteskostanoj !

D.F.

SPIRITA VIVO - VIVO PER LA SPIRITO

* * *

«Sed ni devas ĉiam danki Dion pro vi, fratoj, amataj de la Sinjoro, pro tio, ke Dio vin elektis de la komenco. Al savo en la sanktigo de la Spirito kaj kredo al la vero.» (2 Tes 2:13)

Sanktigo

En artikolo de *Gemeindebibelschule* (Biblia komunuma lernejo) 3/77 estas la jenaj rubrikoj : 1. esti sankta indikas ke oni tute apartenas al Dio, 2. esti sankta indikas ke oni vivadas laŭ Diaj normoj, 3. esti sankta indikas ke oni estas Dia instrumento, 4. esti sankta indikas ke oni estas ŝanĝita de Dio.

Pri (1) oni klarigas, ke oni ne estas senpeka, ĉar Paŭlo nomas la kristanojn de Korinto : "vokitaj sanktuloj", kvankam estis peko inter ili. La titolo precipe rilatas al tiuj, kiuj estis la posedaĵo de Dio.

Pri (2) estas malsama vivado. Oni ne vivadas ankoraŭ kiel la prapatroj aŭ laŭ volupto, kiu ne konsideras Dion, la najbaron kaj eĉ la plejbonon por la persona vivado. Estas kiel gracema vivado sub patro, kiu daŭros, kaj kies mezo estas Dio.

Pri (3) la funkcio de la instrumentoj estas pligrandigi la Regnon. Oni servas kiel popolo, pastro, posedaĵo, en la agoj de Dio en historio kaj vivado, en la konstruado de la Dia domo, kaj en preĝo.

Pri (4) ni laboras kiel Kristo kaj estas ŝanĝataj de la Vorto. La sango protektas kontraŭ la Diablo kaj Jesuo preĝas por ni. Ni ne timas ĉar Jesuo estas apude.

SANKTECO, SANKTA SPIRITO, DONACO DE LA SANKTA SPIRITO - SAINTETÉ, SAINT-ESPRIT, DON DU SAINT-ESPRIT - HOLINESS, HOLY SPIRIT, GIFT OF THE HOLY SPIRIT - HEILIGKEIT, HEILIGEN GEIST, GABE DES GEISTES - SANTIDAD, ESPÍRITU SANTO, DON DEL ESPÍRITU - SANTITÀ, SPIRITO SANTO, DONO DELLO SPIRITO -

Laŭ la artikolo, ĉiuj diskutis ĉi tion en grupoj, kaj precipe - a) kio apartenas al malvera prezento de sanktigo kaj sankteco, kaj - b) kio apartenas al vera kompreno de sankteco? La diskuto devis daŭri nur dek minutojn. Poste oni devis diskuti kiel oni iĝis sankta, kiel oni povas malordigi sanktecon, kaj uzi la Biblion pri la respondoj. Poste oni pensas al individuoj kaj precipe al la sankteco de Jesuo. Tiel oni povas klarigi la tutan temon.

* * *

«Kaj mi, fratoj, ne povis paroli al vi kiel al spirituloj, sed kiel al karnuloj, kiel al infanetoj en Kristo.» (1 Kor 3:1)

Tio aŭ tiu, kiu estas spirita, a) apartenas al la Spirito, b) estas determinata de la Spirito, c) estas influata de la Spirito, ĉ) elfluas de la Spirito.

Frateco gravas

Ĉi tie Paŭlo efektive uzas la vorton "fratoj". Ĉi tio indikas la vojon por povi ĝui la spiritan vivon. Oni devas esti membro de la korpo de Kristo per la nova naskiĝo, kaj tiel membro de la familio de Dio.

Se oni legas de la komenco de ĉi tiu epistolo, estas klare ke la apostolo sendas ĝin al kristanoj, kaj en Korinto kaj en aliaj lokoj, kaj uzas la esprimon "fratoj", kaj la kunteksto indikas kristanojn.

La sveda komentario *Dagen* klarigas ke, pri frateco, la apostolo nun turniĝas de la granda temo pri la stato de la kristana homo al tio en kio la korintanoj trovis sin. Ili ne estis jam tute devontigitaj al la laboro de la Sankta Spirito. Ili estis karnaj, nur malgrandaj infanoj en Kristo. Ili estas fratoj, kiam ili estas kristanoj, eĉ se ili ne estas maturaj...

Ankoraŭ karnaj

Kaj pro ĉi tio trompemaĵ! Ĉi tio estas ankoraŭ unu el la bazaj problemoj de la Eklezio. Konflikto estas agado de la karno, laŭ v. 3:

«Ĉar vi estas ankoraŭ karnaj; ĉar dum ekzistas inter vi ĵaluzo kaj malpaco, ĉu vi ne estas karnaj kaj iradas laŭ la maniero de

homoj ?»

Kiam ajn la salo de la Eklezio perdis sian guston, la tuta amaso estas korupta kaj preta por juĝo. Ni devas gardi nin kontraŭ "saĝo laŭ la karno", laŭ 1 Kor 1:26 :

«Car rigardu vian vokon, fratoj, ke ne multaj saĝuloj laŭ la karno, ne multaj potenculoj, ne multaj nobeloj, estas vokataj.»

Ĉi tio estas la saĝo akirita per nura homa studado sen la Spirito. Komparu la du versiklojn :

«Ne karno kaj sango tion malkaŝis al vi.» (Mat 16:17)

«La Spirito ja estas fervora, sed la karno estas malforta.» (Mat 26:41)

* * *

«La graco de la Sinjoro Jesuo Kristo kaj la amo de Dio kaj la kuneco de la Sankta Spirito estu kun vi ĉiuj.» (2 Kor 13:14)

Vera kuneco

En *Fêtes et saisons* "festoj kaj sezonoj", titolita *Kiuj estas la kristanoj ?*, estas artikolo : *Ĉiuj ne elektas same*, kaj oni klarigas kiel diversaj kristanoj kaj diversaj partoj en la Eklezio ricevis ion malsaman de Dio. La intenco ne estas ke la Eklezio estu dividita, sed ke ĝi estu unu pro la partopreno en la pli vasta komunumo.

En la germana gazeto *Blickpunkt Gemeinde* (Vidpunkto de la komunumo), 1977/03, oni klarigas pri forto kaj organizo en la komunumo, kaj kiel la mondo influas ĝin. Ekzemple, en la 19-a jarcento la enfazo estis pri unuiĝo, trovita en la novaj liberaj eklezioj.

En angla televida programo, je Pentekosta dimanĉo, pastro de Glasgow, Skotlando), parolis al la gejunuloj pri sia naskiĝtaga kuko rilate al la naskiĝo de la Eklezio je Pentekosto. Sur la supraĵo de la kuko estis mapo de la mondo kaj dek du kandeloj, kiuj figuris la dek du apostolojn, kaj ĉirkaŭ la kuko estis homoj, kiuj estis ligitaj unu kun la alia per siaj manoj. Estas deca bildo pri la mesaĝo de Pentekosto.

Ĉio okazas per la graco de Kristo

En la libro *La eminenteco kaj gloro de Kristo* de Robert Rendall, estas klarigo (p. 106) pri la deziro de la konvertita homo, ke li legu la epistolojn de Paŭlo, al la Romanoj kaj al la Galatoj, por ke li komprenu, ke lia sperto okazis pro la graco de Kristo. Oni tendencas pensi tro multe pri la Spirito mem, kaj forgesi ke la laboro de la Spirito estas glorigi Kriston.

«La saĝa homo estas tiu, kiu havas povon distingi inter celoj kaj rimedoj; kiu nek altigas rimedojn tiel ke ili iĝas celoj mem, nek tiel neglektas ilin, ke li endanĝerigas la atingon de la dezirata celo; sed per deca uzo de difinitaj rimedoj atingas la decan celon. Malsaĝa homo nek neglektas la rimedojn de graco, nek tiel altigas ilin, ke li forgesas ilian ĉefan celon.»

«Ni mankas komprenon, se ni ne konstatas, ke tio kio vere gravas rilate al Dio estas "bono kaj justeco kaj vero" kaj ke ĉiuj rimedoj de graco estas nur direktataj al ĉi tiuj gravaj celoj, kaj ne valoras mem fine. Ekskluziva atento pri la instruo de la Nova Testamento rilate al "graco" senigis nin, eble, de la plena signifo de la novtestamenta vorto "obeo", kune kun ĝia korolario "ordono". Ĉar la "ordono" ĉi tie ne estas la leĝo de Moseo, sed la tuta resumo de praktika instruo, kiun la evangelioj enhavas, koncize, la vorto de Kristo, konfirmata de lia propra atesto en lia vivo.»

«"Bono, justeco kaj vero" esprimas eĉ pli ampleksan ekvilibron pri ĝusta vivado, ja rilate al individua karaktero (bono), al sociaj rilatoj (justeco), kaj al realeco antaŭ Dio (vero). Kiel la triopo en nia alia teksto (1 Tim 1:5), ĝi resumas la tutan devon de homoj, al si mem, al homoj, kaj al Dio.» (p. 108)

Ĉio estas trovebla en la novtestamenta amo:

«"Bono" estas io pli ol intenco: ĝi estas aktiva bonfara donaco. Bonkoreco intencas bone; beno parolas bone; bonfara donaco faras bone.»

Kristo la Sanktoleita sanktoleas

"Kristo" indikas "Sanktoleita", kiu efektive estas la signifo de la hebrea vorto "mesio". Li plenumas Jes 11:2:

EVANGELIAJ KAJEROJ

«Kaj estos sur li la Spirito de la Eternulo, spirito de saĝo kaj prudento, spirito de konsilo kaj forto, spirito de sciado kaj de timo antaŭ la Eternulo.»

* * *

«Kaj ĉar vi estas filoj, Dio elsendis la Spiriton de Sia Filo en niajn korojn, kriantan, Aba, Patro !» (Gal 4:6)

Fila rilato estas baza

Ĉiu vera kaj sincera kristano estas filo, kaj ankaŭ misiisto. Do li unue aŭdas la voĉon de Dio, kaj poste parolas por konduki aliajn al Kristo, kiel Paŭlo.

Mi citas el la libro *Por kompreni la Novan Testamenton*, de Prof. D-ro Dietrich Mann, pri ĉi tiu temo en Galatoj (p. 211) :

«La tempo de la leĝo estas anstataŭigita per la tempo de la fido. Fido inaŭguras la inkluzivan dimension de kristana ekzisto. Ĝi estas karakterizata de praviĝo per fido, estado en Kristo per bapto kaj ĝia efiko (ĉ. 3), per la ricevo de la Spirito, kaj la nova pozicio kiel filoj de Dio (ĉ. 3 kaj 4).»

Paŭlo deziras emfazi, ke la Sankta Spirito ne estas donita je la fondado de la galata eklezio pro la faroj de ia leĝo, sed pro la merito de Kristo. En *La Sankta Spirito*, D-ro Smeaton, emfazas ĉi tion.

«La Spirito de la Filo, alivorte la Spirito de adopto, estas plu priskribita de Paŭlo kiel donita al tiuj, kiuj estas filoj per fido, kaj partoprenantoj de la pekliberiĝo.» (p. 70)

En sia komentario, Pastro A. Lukyn Williams indikas :

Tiel ni esperas adopton *huiothesia* (huiothesia) laŭ Rom 8:23 : «Kaj krom tio, ni mem, kiuj havas la unuaĵon de la Spirito, ĝemas en ni, atendente nian adopton, nome la elaĉeton de nia korpo ! Kvankam laŭ unu senco jam ricevitan.» (supre 3:26 : «Ĉar vi ĉiuj per la fido estas filoj de Dio en Kristo Jesuo» kaj 4:5 : «Por reaĉeti tiujn, kiuj estas sub la leĝo, por ke ni ricevu la filadopton»).

La perspektivo de la enloĝiganta Spirito

Estas kvazaŭ Kristo enloĝiĝas en ni kaj vivas tie per la Spirito. Pro ĉi tio estas ĉiam preĝo en la koro. Kiam Kristo vivadis en la mondo, li ĉiam estis spirite kun la Patro, kaj parolis kun Li. Tiel per la enloĝiganta Spirito ni ankaŭ povas diri «Patro» kiel la titolon de nia Dio. La preĝo kiun Jesuo donis al siaj disĉiploj komenciĝas per "Patro nia". Estas sperto kun Jesuo en la koro, per kiu ni rilatas kun Li al la Patro, lia Patro kaj nia.

Nia celo devas esti, ke li iĝu la gasto en la koro kaj la animo. La judoj ankaŭ povas paroli pri la vivanta Dio, sed ne estas tia intima sperto. Estas interese, ke en la antikva eklezio ne okazis tuja apartigo for de judaismo. Vivo per la enloĝiganta Spirito atentigas pri la posta *parousia* (parousia) "ĉeesteco" de Kristo, kiam li revenos.

La elsendo de la Spirito

La Spirito venas de la Patro per la Filo, kaj inverse preĝo atingas la Patron per la Filo. Agoj 2 estas grava rakonto pri la Pentekosta tago, juda festo. Ĝis la nuna tempo oni celebris ĉi tion, kaj en la sinagoga vivo oni instruas pri la elsendo de la leĝo al Moseo sur la monto Sinaj. Tiam la instruo de Dio estis laŭ la leĝo kaj ordonplena; en la Spirito ĝi estas persona kaj gvidas en ĉiuj decidoj.

* * *

«Ĉar nia Evangelio venis al vi ne nur parole, sed ankaŭ kun potenco kaj kun la Sankta Spirito kaj plena certigo; vi scias, kiaj homoj ni ĉe vi montriĝis pro vi.» (1 Tes 1:5)

La povo estis la Spirito

Estas kvazaŭ Paŭlo jam legis en Zefarja 4:6:

«Tiam li responde diris al mi jene: Tio estas la vorto de la Eternulo al Zerubabel, kaj signifas: ne per militistaro kaj ne per forto, sed nur per mia Spirito, diras la Eternulo Cebaot.»

La rekonstruado de la Templo estis pli ol homa laboro. Bedaŭrinde

kristanoj ofte uzas homan forton kaj povon, aŭ eĉ influon, anstataŭ Dia instruo kaj promeso. Aliflanke kontrastas la pentekosta historio pri disĉiploj, kiuj estis senkuraĝas kaj iĝis eĉ kuraĝaj atestantoj, kiam la Dia Spirito malfermis la okulojn de homoj kaj tiuj ĉi fariĝis fidemaj.

Ĉi tio povas okazi nuntempe. Ĉi tio ankaŭ donas kuraĝon por establi ĉiujn niajn povojn. Nia peto estas : «Venu, Sankta Spirito !» Kie ajn en la Biblio oni raportas pri la Sankta Spirito, estas kvazaŭ oni spuras printempan povon, kiu eltrudas la novan vivon el la grundo, ja eĉ pli, estas la povo de Dio kiu vekas el la mortintoj. La Sankta Spirito ne permesas ke la ĉeesto de Dio iĝu pli malgranda aŭ malfortiga laŭŝajne, sen senpera rilate al proksimeco, urganta kaj haltigebla. Se Dio promesas ke io estos per Lia Spirito, do tio celas grandan eblecon de la nova vivo.

* * *

«Ho malsaĝaj Galatoj, kiu vin ensorĉis ? vin, antaŭ kies okuloj Kristo Jesuo estis publike prezentita krucumita. Nur la jenon mi deziras sciigi de vi : Ĉu per faroj de la leĝo vi ricevis la Spiriton, aŭ per la aŭdado de fido ? Ĉu vi tiel malsaĝaj estas ? komencinte en Spirito, ĉu vi en karno nun perfektigas ?»
(Gal 3:1-3)

La komenco en Spirito

Ni legas en la unua verso, ke la Galatoj ekkonis la mesaĝon de la kruco, kiu estas la vera komenco de spirita sperto. Ni devas enfazi la spiritan aspekton de la kruco, ne nur la mesaĝon de la historia Kristo. Memoru ke malantaŭ la kruco estas rifuzo, laŭ Joh 1:11-13 :

En sia libro *Tiam la Spirito venis*, pastro Johano Pettingell klarigas jene (p. 318) :

«En 1 Korintanoj estas la Spirito, kiu revelacias la veran saĝon en niaj koroj (ĉ. 2), kaj kiu kondukas nin al Kristo (ĉ. 1) per la povo de la kruco (ĉ. 1), tiel ke ni iĝas la templo de Dio (ĉ. 3).»

Antaŭe (p. 317) la verkisto mencias Galatojn jene :

«Estas la respondo de la homoj al la Spirito kiu faris ilin esti

EVANGELIAJ KAJEROJ

kristanoj (ĉ. 3) kaj estas ilia daŭro pri ĉi tiu respondo kiu decidus ĉu ili vere estas (ĉ. 5). Estas li kiu indikas al niaj koroj la verecon de nia fileco, kaj la liberecon kiun ĝi alportas (ĉ. 4, kp. Rom 8)».

Estas la mesaĝo de la nova naskiĝo. D-ro George Smeaton, en sia libro *La Doktrino pri la Sankta Spirito* klarigas jene :

«Obstakloj staris kontraŭ la reveno de la Spirito al la homa koro tiaj, ke ili estis nevenkeblaj per finitaj rimedoj. Sed ili estas formetitaj per la anstataŭa ofero de Kristo kaj per lia reĝa pastreco ; tio estas, per merito kaj efikeco, aŭ aĉeto kaj povo.

La efika agado de la Spirito antaŭsupozas la suverenan amon de Dio al individuoj, aŭ personan elekton. Konsiderata de la vera vidpunkto, la elektanta intenco de Dio implicas, ke sia efiko havas specialan celon, kaj ke ĝi atingos siajn decajn intencojn.

Tiuj, kiuj interpretas la Dian Vorton per la baza aksiomo ke ĉiu homo devas partopreni same, kaj kiuj atakas la absolutan rajton de Dio ke Li donacu savon, kiel homoj donacas sian almozon laŭvole per pure libera donado, tiuj forgesas, pro sia deziro esti amikaj pri la spirito de nia epoko, ke la avantaĝo kiun ilia teorio laŭŝajne gajnas per la plivastigo de la amplekso de la amo de Dio estas pli ol kontraŭpezita aliflanke, pro manko de efikeco.»

* * *

«Ĉar kiu semas por sia karno, el la karno tiu rikoltos putradon ; sed kiu semas por la Spirito, el la Spirito tiu rikoltos eternan vivon.» (Gal 6:8)

Dezirata rikolto

La esena komunumo de la Morta Maro enfazis la leĝon de Dio, laŭ aludo en *Sankta Johano Baptisto kaj la spiritualeco de la dezerto*, de Johano Steinman (p. 19) jene :

«Pri la sciencoj, ili nur kulturas tion, kiu respektas la ekziston de Dio kaj la originon de la universo, sed ili

diligentas forte al moralo, prenante senĉese kiel gvidilojn la leĝojn de siaj prapatroj, kiujn la homa spirito ne povus koncepti sen la inspiro de Dio.»

Similecon inter la skribrulaĵoj kaj la epistolo al la Galatoj, rilate al rikolto de la laboro de la karno kaj al la frukto de la spirito indikas alia libro pri la komunumo, *La Qumran-aj esenoj*, de D-roj Johano Maier kaj Kurt Schubert. Rimarku la skribrulaĵon de *Disciplina*, jene (IV, 2 ĝis IV, 14) :

«Ĉi tiuj estas iliaj vojoj sur la tero (estas la laboro de la spirito de vero), informi la homan koron, ebenigi antaŭ li la vojon de vera justeco, kaj meti timon en lian koron pri la juĝo de Dio ; spirito de humileco kaj sindeteno, de abunda amo kaj de eterna bono, de kompreno kaj inteligenteco, kaj de la vera saĝeco, kiu fidas al ĉiuj agoj de Dio kaj baziĝas sur la pleneco de Lia graco ; spirito de la scio de ĉiu kreadpenso (de Dio ?) kaj de fervoro pri justaj ordonoj.»

Eternan vivon

Nia vivo povas uziĝi de Dio eĉ post nia morto, por paroli al aliaj, kaj ankaŭ per morto, ni povas ĝui eĉ pli mirindan kuniĝon kun Li.

Fakte eterna vivo komencas ĉi tie, se ni kredas la Evangelion ; estas la plej altkvalita vivo, kaj se ni estas kristanoj ni havas certigon ke ni havas ĝin, laŭ 1 Joh 5:12 :

«Kiu havas la Filon, tiu havas la vivon ; kiu ne havas la Filon de Dio, tiu la vivon ne havas.»

Tiu ĉi estas unu el la tekstoj, kiujn mi devis lerni memore por iĝi "Naviganto", por helpi aliajn lerni la Sanktan Skribon (Esperantistoj ankaŭ uzas ĉi tiun movadon, kontaktu KELI-n). Dum la lernado, mi ankaŭ proklamis la situacion al virino, kiu laŭŝajne ne sciis, ĉu ŝi estas kristana aŭ ne ! Nu, mi legis en la biblia studlibreto de R. W. De Haan jene :

«Mi ofte citas ĉi tiun tre gravan tekston (Gal 6:7 : «Ne trompiĝu ; Dio ne estas mokata ; ĉar ĉion, kion oni semas, tion ankaŭ li rikoltos») pro miaj infanoj, avertante ilin ke ni ne nur rikoltas laŭ speco tion, kion ni semas, sed ke la rikolto estas

ĉiam multe pli granda ol la origina plantado. Ĉi tiu teksto, pro tio, estas kuraĝigo por la piaj, kiuj dissemadas la semon de la Vorto de Dio kaj plenigadas la 'mondkampon' per agoj de kristana bonkoreco. ... Juna viro, juna virino, kiajn semojn vi plantadas dum vi vivadas ? Memoru, ke la rikolto ne nur influos vin, sed, se Jesuo malfruos, naskiĝontajn generaciojn ankaŭ. Ĝi rilatos ne nur al tempo, sed al eterneco. Atentu pri tio, kion vi semas !»

Sed estas terura danĝero ! Se ni lasas elekton, ni semos malbonan semon, kaj la rikolto estos putrado. S-ro De Haan ankaŭ diras :

«Estas terura averto por ĉiuj, kiuj plantadas la pekkreskaĵaĉojn, kaj dissemadas la malbonajn sporojn de dubo kaj spirita ribelo.»

La Sankta Spirito ebligas

Se ni semas por la Spirito, ni ne multe grumblas pri la tero de la kampo ! Estas mirinde, kian laboron oni povas fari, eĉ se ĉio estas laŭŝajne kontraŭa.

Estis oficiro de la Savarmeo, kiu bedaŭrinde paraliziĝis, sed li ekkomponadis muzikon por la himnoj. Ĉi tiu muziko estis iom stranga, ĉar S-ro Of. Marshall tiel lerte aranĝis ĉion, ke eĉ la kromsignoj kaj malakordoj iĝis aspektoj de la ario. Estis kiel en vivado, multaj problemoj, sed se ni havas la Sankta Spiriton, estas el nia vivado mirinda rezulto. Ĉi tiuj arioj ankoraŭ kantigas inter la anoj de la Savarmeo ; ĉi tio estas la rikolto de la spirita vivo.

Mi ne povas forgesi la ateston de mia patro, pri la helpo de mia patrino en lia vivo, ke li fariĝu kristano. Li finis : «Ĉu vi deziras esti semisto ?»

Ĉi tiu juna virino nur skribis leteron al li, kaj ĝi uziĝis por lia konvertiĝo ; nur eta semo, sed semita por la Spirito. Kaj ĉi tion aliaj povas fari !

En la eklezio, ni povas esti laboristoj kune kun Dio por la Spirito.

• • •

«Kaj kiu ankaŭ sciigis nin pri via amo en la Spirito.» (Kol 1:8)

La kristana manifestado : amo

La ĝojo, kiu venis en la koron de Paŭlo rilatis al amo.

La amo en la Eklezio indikas ke Jesuo deziras nutri la homamason. Amo estas la frukto de la enloĝanta Spirito, la Sankta Spirito.

«Sed la frukto de la Spirito estas amo, ĝojo, paco, pacienco, komplezo, bonkoreco, fideleco.» (Gal 5:22)

«Por ke Li donu al vi laŭ la riĉo de Sia gloro, ke vi estu potence fortigitaj en la interna homo, per Lia Spirito ; por ke Kristo loĝu per fido en viaj koroj ; tiel, ke vi, enradikigite kaj bazite en amo...» (Efe 3:16-17)

La amo ne devas esti sur la monto, sed inter homoj, inter viroj el la "homamaso", kiel en Luko 9.

* * *

«Sed nun, fratoj, se mi venus al vi, parolante per lingvoj, kiel mi vin helpus, se mi ne parolus al vi, aŭ en formo de malkaŝado, aŭ de sciado, aŭ de profetado, aŭ de instruado.» (1 Kor 14:6)

La profetado

Pri ĉi tio mi pensas unue kiel pri formo apud parolo per lingvoj. En la itala libro *La mano de la animo*, vol. 1, de Pastro P. Segneri, p. 738-739, mi trovis la ligon kun la Malnova Testamento. Tie la profetoj "prognozis" laŭ antaŭdiro, rilate al la farotaĵo, kaj en la Nova Testamento la apostoloj predikis rilate al la faritaĵo.

La volumo V de la sveda komentario *Normans-Dagen* estas greka vortaro, en kiu oni klarigas pri profetado, kiel spiritinspirata mesaĝo donata en aktuala situacio (vorto 3851, p. 813). *Neukirchena* kalendaro indikis :

«Per la profeta vorto kaj per la apostola letero la Biblio naskiĝis.»

EVANGELIAJ KAJEROJ

La malkaŝado

La lasta libro de la Nova Testamento estas "la malkaŝado" aŭ "Apokalipso". Ĉi tio indikas manifestadon, kaj laŭ ĉefepiskopo Trench interpreto estas implicata. Rilate al profetado ĝi estas kiel la profetoj de la Malnova Testamento distingitaj de la libro de Daniel, kiu estas apokalipsa, kaj troviĝas inter la libroj de la "Skriboj" (*ketuvim*), la lasta sekcio de la Malnova Testamento.

Pri malkaŝado la emfazo ŝajne estas estonteca, kaj eble tio pri profetado devas esti pri predikado. Estas kiel senvualigo, estas alia kontrasto apud parolo per lingvoj.

La ĉeĥa libro *Enkonduko al la legado de la Nova Testamento* de D-ro Jan Merell enhavas iujn interesajn ŝirmopaĝojn de diversaj biblioj, kiuj enkorpigas apokalipsajn figurojn, kvazaŭ oni dirus, ke la mesaĝo estas Dia revelacio. Pri la libro "Apokalipso", li diras (p. 198), ke ĝi estas profeta kaj simbola libro, kaj pro ĉi tio tiel malfacila por klarigi. Tamen oni ne devas forturniĝi de tia Apokalipso sed prediki pri ĝi. Ne rifuzu peni klarigi la simbolojn !

Estas iuj malkaŝoj, kiuj estas nedireblaj, laŭ 2 Kor 12:4 :

«Ke li estis eklevita en paradizon, kaj aŭdis nedireblajn vortojn, kiujn ne estas permesate al homo paroli.»

Iuj supozas ke Paŭlo estis ĉi tiu homo speciale eklevita, kvazaŭ li estu iu alia.

Sciado

En la greka estas *'ev yvwrei* (en gnosei) "en sciado". Estis en la antikva eklezio ankaŭ la gnostikoj, kvazaŭ ili estis la "informitaj".

Vera sciado sole estas trovebla en Kristo, la Filo de Dio, enkarniĝinta. Li devas esti vere Filo de Dio kaj ankaŭ Filo de homo.
«En kiu estas kaŝitaj ĉiuj trezoroj de saĝeco kaj de scio.» (Kol 2:3)

Oni devas rimarki, kiel la antaŭa ĉapitro indikas, ke kune kun sciado oni devas ami, alimaniere oni estas nur nenio.

La instruado

La greka vorto *διδάχνη* (didakhe) baze rilatas al doktrino, kaj estas la titolo de la antikva eklezia "didaĥo". Ĝi estas praktika, kaj rilatas al la ceremonioj de la Eklezio kaj ankaŭ al la konduto. En la antikva Eklezio estas la enfazo pri *κηρυγμα* (kerugma) "predikado" kaj pri *διδάχνη* "instruado". Tamen, en ĉio oni devas enfazi la bazan mesaĝon pri la kruco.

Laŭgrade tradicioj naskiĝis :

«Tial, fratoj, staru firme, kaj tenu la tradiciojn, kiujn vi lernis ĉu per parolo, aŭ per la letero nia.» (2 Tes 2:15)

Neukirchena kalendarfolio tre klare klarigis, ke ne povas esti kredo sen Dio, kaj la certeco de la Biblio estas ligo kun la ĉielo, kaj ne estas produkto de nia propra animpovo.

En la antikva Eklezio la instruado de la Sinjoro estis agema, kiel oni trovas en Agoj 13:12 :

«Tiam la prokonsulo, vidinte la okazintaĵon, kredis, mirigite de la instruado de la Sinjoro.»

Estis simile pri Kristo :

«Kaj ĉiuj miregis tiom, ke ili diskutis inter si, dirante : kio estas ĉi tio ? Jen nova instruado ! Kun aŭtoritato li ordonas eĉ al la malpuraj spiritoj, kaj ili obeas lin.» (Mar 1:27)

* * *

«Ĉar ni en la Spirito atendas la esperon de justeco per la fido.» (Gal 5:5)

Justeco

Ĉi tio estas grava temo en la Vorto de Dio, kaj por rememorigi min mi havas marketraĵon sur la muro, kiu indikas *יהוה צדק* (JHVH cidkenu : La Eternulo, nia justeco). Mia sveda biblio havas aldonon de bibliaj vortoj, kaj inter ili estas "justeco", klarigita jene :

«Baze, ĉi tio estas la justeco de Dio, speciale kiam justeco indikas la popolon malposedatan aŭ piulojn, multe simila al

"graco", "helpo", "liberigo", "beno">

La greka rilatas al honesteco, pravo kaj senkulpo. Perfekta kaj persona justeco estas prenata en Galatoj, kiel la objektiva espero prezentata al la kristano.

Pastro A. Lukyn Williams indikas en sia komentario :

«La enmetado de "espero" sugestas la bezonon de daŭro en la servado de Kristo. Estas senco laŭ kiu, justeco estas donita al la kredanto tuj (Rom 9:30 : «Kion do ni diru ? Ke la nacioj, kiuj ne sekvis justecon, atingis justecon, la justecon, kiu estas el fido.»), sed ĝia kompleta posedo ne okazos antaŭ la alesto.

En la Spirito per la fido

Ni ne devas stari ekstere kiel hipokritulo, kiu nur parolas pri onidiro, kaj nur ŝajnas esti sankta. La Spirito faras kuraĝulojn, kiuj estas atestantoj, kvankam ŝafoj inter lupoj. Estas beno en ĉi tiu vivo, kaj en la venonta.

«Kio retenas min ? Iu surtera ligo ? Gajnsolfo ? Stranga vivimpliko ? Vanta plezuro ? Amata Sinjoro, mi forĵetas ĉion tiel volonte ; la vojon de vera disĉipleco mi sekvos kun vi.» (Adams)

Sen fido estas neeble ricevi ion de Dio. Ni praviĝas per fido, ni sanktiĝas per fido kaj pleniĝas per la Spirito en fido. La vojo de fido estas la vojo malsupren, per kiu Dio venas al ni. La Sanktan Spiriton Jesuo promesis. En justeco ĉiuj estas kusta korpo. Ĉu vi permesas, ke la Sankta Spirito helpu rilate al via fido, por ke vi vere vivu en Kristo ?

J. P. Twilley, Britio
kunigita teksto el predikoj
n-roj 247, 735, 739, 759, 830,
980, 1047, 1091, 1116, 1133, 1134.

John Frederic TWILLEY [tɔjle], brito (1914), post dungiteca periodo predikis kaj studis teologion, fariĝis pastro. Dum longa periodo li dissendis en Esperanto predikojn, el kiuj estas ĉerpitaj la supraj tekstoj.

LA SANKTA SPIRITO, APARTA DONACANTO

Sankta ?

Tute je la komenco mi volas klarigi precize kion "sankta" signifas. Oni multe aŭdas kaj legas pri la "Sankta Dio" kaj la plimulto opinias ke "sankta" signifas "dia", grandioza, sublima, ktp., alivorte ion ege superan.

Sed kion diras Dio tiurilate ? Jen kelkaj citaĵoj : en Levidoj 19:2 Dio diras : «Sanktaj estu, ĉar sankta estas Mi, la Eternulo», kaj pli-malpli la samon en 1 Petro 1:16. En Levidoj 11:44-45, Dio ree ordonas «sanktigu vin kaj estu sanktaj ĉar Mi estas sankta» (Ĉiloke speciale la perikopo rilatas manĝadon de abomenaĵoj, ion kion Dio-timaj homojn ne faru, niaj korpoj ja estantaj "la templo de Dio"). Laŭ Eliro 19:6 ; 22:31 ; 1 Petro 2:9 ; Readmono 7:6 ; 26:19 kaj Jesaja 6:12, ni estas/estu je Li sankta popolo/nacio kaj sanktaj homoj.

Kion do signifas "sankta" ? Nepre ne ion superan, subliman, majestan, moŝtan aŭ imponan ! "Sankta" tre simple signifas "apartigita", "apartiĝinta". JHVH la Eternulo, la Plejaltulo tenas Sin tute aparte de Baalo, Odino, Jupitero kaj ĉiuj aliaj de la gedioj de la nacioj. Mi ne scias ĉu eble tiuj gedioj iam havis sian propran organizon de Unuiĝintaj Dioj, sed ĉiukaze la Sankta (apartiĝinta) Dio neniam estus estinta ano de tiu asocio. Nepre ne !

Inago

Ni imagu ke unu el la dioj de la nacioj iakaŭze decidus apartiĝi, kaj de la aliaj dioj, kaj de la Plejaltulo, kaj ordonus al siaj aliĝintoj same fari rilate la aliĝintojn, tiel de la aliaj dioj kiel de la Plejaltulo. Tiam pro tiu aparteco tiu dio kaj ties homoj ankaŭ estas fariĝintaj "sanktaj" sed estas alia speco de sankteco !

SANKTECO, DONACO DE LA SANKTA SPIRITO - SAINTETE, DON DU SAINT ESPRIT - HOLINESS, GIFT OF THE SPIRIT - HEILIGKEIT, GABE DES GEISTES - SANTIDAD, DON DEL ESPÍRITU - SANTITÀ, DONNO DELLO SPIRITO -

EVANGELIAJ KAJEROJ

Pluen : Imagu nur ke Satano decidus apartigi sin kaj siajn aliĝintojn de la "fia" Plejaltulo kaj de Ties aliĝintoj pro tio ke tiuj daŭre klopodas forlogi liajn aliĝintojn al siaj pens- kaj ag-manieroj, tiam ili, estante apartiĝintaj, ankaŭ estus "sanktaj", sed kia speco de sankteco !! Esperanto ja ne havos vorton por tio !

Daŭrige, iu bestbredisto bredas altkvalitajn bovinojn laktoproduktajn, celante multan lakton kaj altan krem-procenton. Ĉiu besto kiu estus malpli altkvalita, forlasas la gregon kaj poste troviĝas ĉe la buĉisto. Tio estos tre apartigita bovaro, alivorte tre "sankta" bovaro.

Bileam

La profeto kiu devis malbeni la Izraelan popolon, sed rifuzis, laŭ Nombroj 23:9, de surmonte rigardis la Izraelan tendaron kaj «jen la popolo loĝas aparte kaj ne estas kalkulita inter la nacioj», do sankta popolo.

Laŭ ĉio tio klare estas ke la Sankta (apartiĝinta) Dio postulas, ke liaj sanktaj homoj ne havu amajn aŭ amikajn rilatojn kun aliĝintoj de la aliaj dioj, tiuj de la nacioj, sed restu tute apartaj de ili «ĉar amikeco je la mondo estas malmamikeco rilate Dion». Kompreneble ne estus eble tute eviti la aliĝintojn de la dioj de la nacioj, estus necese ke "ni tute forlasus la teron."

La saĝa reĝo David bone solvis tiun problemon. Li ja havis amikajn rilatojn kun najbara reĝo sed tute ne interesiĝis je ties dioj aŭ ties religio. Same tiu ruza reĝo ne klopodis konatigi siajn diojn al David. Ili restis nuraj komercaj amikoj, ĉar por ambaŭ estis profitodona komerco kaj kiam mono parolas... Neniu profeto iam admonis Davidon rilate amikecon kun la mondo (aŭ la idoloj).

Kelkajn generaciojn pli poste, reĝo Aĥab ankaŭ havis komercajn rilatojn kun tiu sama lando kaj popolo. Cele al plimultigo de siaj profitoj, li ne nur prenis reĝidinojn kiel edzinojn el tiu regno, sed enkondukis la malĉastan baalan religion en sian regnon ("Ni ja devas respekti la religion de homoj kiuj tiom multe importas el nia lando"). Tutcerte troviĝis kelkaj baalaj sanktejoj en Izraelo, kie, por kuniĝi kun la loka dio (aŭ diino), oni kuniĝis kun la belaj templaj malĉastulinoj, aŭ pli

respekte, la malĉastaj monaĥinoj.

Tute male al David kiu pace kaj maljune mortis, Aĥab mortis en batalo kaj la kamparaj hundoj forlekis lian sangon kaj la pekema edzino estis viktimo de politika murdo kaj la malsataj urbaj hundaĉoj tute formanĝis ŝian pekan korpon lasante nur kelkajn ostpecojn, kelkajn nemanĝeblajn juvelaĵojn kaj silkajn ĉifonaĵojn !

La pia rabeno Akiba foje diris, ke ni ne tro amike klopodu malputrigi la putrajn pomojn (la fiulojn), alimaniere ni mem komencas putriĝi kaj ĝuste tio okazis al Aĥab.

De la vorto "sankta" ni havas la novan vorton "sankcioj", kiun laŭ mia memoro, oni unuan fojon uzis kaj aŭdigis post la itala konkero de Etiopio, kaj kiu ne troviĝas en malnovaj vortaroj. Ĉifoje la fidelaj adorantoj de Dio ne kiel pasintece sin apartigis de la pekuloj, sed male la tiama Ligo de Nacioj postulis, ke ĉiuj landoj ĉiurilate bojkotu Italion por ke tiu lando, pro malsatoj, forlasu Etiopion, alivorte la mondo tute apartigu Italion. Neniu volis resti sen importaĵoj el Italio, aŭ ĉesi eksporti al Italio, kaj kompreneble la tuta alvoko fariĝis sukcesplena fiasko. Same aliloke kaj alitempe poste sankcioj okazis.

Laŭ Apokalipso estonte venos novaj sankcioj, kiam tiuj kiuj ne estas aliĝintoj de la Antikristo, ne rajtos vendi aŭ aĉeti, alidirite, estos malpermesitaj vendi al aŭ aĉeti de tiuj, kiuj estas fidelaj al Dio.

La Sankta Spirito, en la Malnova Testamento kelkfoje nomata la Spirito de Dio, laŭ la aldonajo "Sankta" ankaŭ estas apartiĝinta kaj fora de la aliaj (eksterĉielaj) spiritoj.

Malsanoj

Ĉiuj enĉielaj estaĵoj, de la plej altrangaj ĝis la plej malaltrangaj, estas "sanktaj", tio estas, apartiĝintaj kaj ne havas amikajn rilatojn kun la ekstera mondo, ĉar amikeco al la mondo, ĉu la homa mondo ĉu la spirita mondo, estas malamikeco al Dio.

La Ĉiosaĝa Sankta (apartiĝinta) Dio bone sciis, ke Siaj Sanktaj aliĝintoj, pro la delogoj de Satano, estonte eble emos amikiĝi kun la

idolanoj, speciale ties belaj inoj, kaj pro tio Li frue jam kreis "vipon" por puni la malobeemulojn.

La izraelidoj, kiuj laŭ Bileam, tiel imitinde kondukis, poste apud la migradvojo renkontis idolanan popolon kaj multaj el ili peke edziĝis kun la idolaninojn. Sed ho ve ! Iu loka malsano, de kiu la izraelidoj ne estis nature protektataj, dum kelkaj tagoj mortigis pli ol dudekmil da ili. La leĝoj de Dio, la religiaj kaj la sanecaj, estas obeendaj. Dio ne estu mokata !

Dum la konkero de la Kanariaj insuloj, miloj da insulanoj strangmaniere mortis pro la malsano "*modorra*" enportita de la hispanoj, kiuj estis tiel imunaj je tio ke ili eĉ ne sciis, ke ili portis la malsanon sur si.

Ĉe la suda pinto de la afrika kontinento, la nederlandanoj pasintece fondis malgrandan kolonion cele produkti manĝaĵojn por siaj preterpasantaj ŝipoj sed ne interesiĝis je io granda en duondezerta lando, kie oni ne povis produkti spicojn kaj kie ebleco de profitodona komerco ne estis.

Post monatoj surmare, maristoj de kelkaj nacioj tiele malsatis je virinoj, ke atinginte la kolonion, ili malĉastis tie kun hotentotaj virinoj. Sed, ŝipoj foje alportis variolon, kaj tiu blankula malsano, kiu en Eŭropo pli malbeligas kaj cikattras ol mortigas, ĉilande, kvazaŭ la Nigra Morto, forportis preskaŭ la tutan hotentotan popolon, lasante nur nombron en regiono iom aparte troviĝanta. Tiuj variolaj epidemioj povas esti rigardataj kiel la kaŭzo kaj la komenco de la Sudafrika Respubliko. Sen tio la nederlanda kolonieto estus restinta samgranda kiel la nuna ŝtato Israelo. Kun senhomiĝinta lando antaŭ si, mizeraj transvivintoj de la 30-jara milito, hugenotaj fuĝintoj kaj aventuremaj nederlandanoj tion invadis malgraŭ registaraj avertoj, ĉar ilia opinio estus preferinde esti manĝataj de malsataj leonoj ol resti en ruiniĝinta Eŭropo.

Observe

La Sankta Spirito avertas nin kaj gvidas nian ĉiutagan sintenadon al Dio, sed estas multaj homoj, kiuj rifuzas esti avertataj kaj gvidataj, kaj ĝuste tie Dio havas Sian vipon por la dorso de la malobeemuloj.

EVANGELIAJ KAJEROJ

Estas multaj nuntempaj hebreoj, kiuj malobservas sabaton kaj aliajn erojn de la Leĝo, sed rilate la amikeco kun la mondo, ili same kiel reĝo David, havas nur "komercan amikecon" kun la ne-hebreoj.

Fidele observante almenaŭ tiun parton de la Leĝo, hebrea persono (vira aŭ virina) bone scias ke li (ŝi) eksteredzece akiros malsanon, pri kio li (ŝi) kaj la idoj, ne havas imunecon.

Algvido

Ordinare la Sankta Spirito faras multon, etan kaj grandegan, eĉ se ni tion ne scias. Li ekzemple metas subitan emon aŭ sopiron en ies koron. Iu nekredulo ekzemple estas invitata de kristana kunlaboranto akompani lin preĝejen. Scivoleme, pro la Sankta Spirito, li iras rigardi tiujn strangajn homojn kaj ĝuste tiam li akceptas Jesuon kiel sian savanton.

Iu usona mafiano kune kun kunuloj veturis al malproksima urbo por tiuregione prirabi vagonaron. Dum li estis faranta esplorojn rilate vagonarojn kaj hortabelojn, li neatendinte iomdistance ekrimarkis detektivon de sia hejmurbo. Tiu tutcerte suspektos lin je la farita prirabo. Estante antaŭ pentekostana preĝejo, li tuj eniris kaj eksidis inter la aŭskultantaro. Ĝuste tiun vesperon li sin transdonis al Jesuo. Post la kunveno li ĉion rakontis al siaj kunuloj kaj aldonis ke li estonte ne plu krimos kaj petis ilin lasi la raboprojekton kaj prefere imiti lin.

Aliloke alkoholemulo survoje al la drinkejo, iamaniere de la Sankta Spirito estis gvidita al pentekostana preĝejo, kie li ankaŭ sin transdonis al Jesuo. Enirinte sian hejmaĉon, li gaje diris: "Venu karulinjo, ke mi ĉirkaŭbraku kaj kisu vin." Teruriginte edzino kaj idoj forrapidis, opinante ke li estas eĉ pli ebria ol kutime, dum vere la plejlastan glason li estis englutinta la antaŭan tagon.

Samaniere kiel la etiopan eŭnukon kaj Filipon, la Sankta Spirito gvidis la samarianinon al la puto, ĝuste kiam Jesuo tie alvenis, kaj li klarigis al ŝi la vojon al la Dia paco.

Multamaniere la Sankta Spirito intervenis kaj savis nin. Iu malfruiĝis kaj maltrafis la vagonaron aŭ aŭtobuson, kiu iom poste troviĝis en

akcidento. Iu malsingarde lasis fali botelon, kiu fakte estis forta veneno aŭ acido en trinkaĵ-botelo.

Pere de la Sankta Spirito, Petro eĉ povis "legi pensojn". Ananias kaj Safira vendis bieneton. Poste ili donacis parton de la vendosumo al la kristana komunumo, deklarante ke tio estas la tuto. Pro tiu mensogo antaŭ Dio, ili ambaŭ mortefalis.

Spiritisme

Ĉe S-ro earle, ja la Sankta Spirito plie estas ega potenco, kaj ne persono, sed en la kristana mondo la Sankta Spirito estas potenca persono, do potenca kaj potenco.

Mi posedas kelkajn brazil-devenajn spiritismajn librojn, kiujn mi atente tralegis por ekscii kion "la aliulo" pensas kaj kredas, ne celante ŝanĝi mian religion (samcele multaj hebreoj ankaŭ pristudas la Novan Testamenton, kiel foje mia iama kunlaborantino Mirjam klarigis al mi). Kelkaj estas de la mediumo (interulo) Francisco Cândido Xavier, preskaŭ analfabeta neklerulo, kiu mediume jam surpaperigis pli ol okdek ege klerajn librojn.

En lia *Paŭlo kaj Stefano* diktita de la "spirito Emmanuel", li tiel simpatieme priskribas la travivaĵojn de tiuj du viroj de Dio, ke la leganto ege atente kunvivas ĉion tion kun ili kaj speciale la paŭlajn spertojn sur la vojo al Damasko. En neniu de tiuj spiritismaj libroj, legitaj de mi, troviĝas io malamika aŭ blasfema rilate la Evangelion. Se tiu libro estus havebla en nombro de tradukoj, ĝi estus troviĝanta en la libraro de pli ol unu kristana pastro !

La fruktoj de la Sankta Spirito

La fruktojn de la Sankta Spirito oni interalie priskribas en Galatoj 5:2-23, kaj estas la jenaj naŭ : amo, ĝojo, paco, pacienco, komplezo, bonkoreco, fideleco, mildeco, sinregado. Tiuj estas homaj ecoj kaj kelkaj el tiuj troviĝas ĉe ĉiu individuo, ankaŭ ĉe ateisto.

Post konvertiĝo, kelkaj el tiuj fruktoj pliboniĝas dum aliaj unuafoje ekaperas. Tiu, kiu pasintec ege blasfemis ĉiuokaze, kiam lia nuda piedo

frapis ŝtonon, aŭ kiam taso da varmega teo renversiĝas sur lin, ne plu blasfemas. Koleremaj homoj post konvertiĝo praktikas sinregadon, kaj post iom da tempo agas kaj aspektas kiel anĝeloj.

La rabeno Hillel, pli-malpli samtempo de Jesuo, neniam ekkoleris, nek perdis la paciencon kaj sinregadon malgraŭ tio, ke vere homoj vete klopodis kolerigi lin.

Malgraŭ diraĵoj de ŝerculoj, la ĉeesto aŭ foresto de tiuj ĉi kaj aliaj psikologiaj homaj ecoj (alivorte la fruktoj) multe efikas por la homa korpo kaj saneco. La kristana usona kuracisto verkisto S. I. McMillan en sia *None of these diseases* (Neniu el tiuj malsanoj) rakontas kiamaniere venĝemo, koleremo, malespero, ĉagreno, kaj aliaj putraj fruktoj malbone efikas por la homa korpo, kaj kiel bonefika estas tute lasadi ilin.

La donacoj de la Sankta Spirito

En 1 Korintanoj 12:8-11 oni citas la naŭ donacojn, nome saĝeco, fido, resanigo, mirakloj, profetpovo, distingo de spiritoj, diversaj lingvoj kaj interpreto de lingvoj.

Ne kiel la fruktoj de la Spirito, kiujn la koncerna homo ĝenerale parte jam havas en si kaj kion la Sankta Spirito nur plifortigas kaj pli ampleksigas, la donacoj de la Sankta Spirito estas io, kion la Spirito tutnove enigis en konvertiĝintan homon.

Kiel la sudafrika korĥirurgo D-ro Barnard pasintecce engreftis novan koron en homon, la Sankta Spirito engreftas unu, aŭ plurajn el tiuj donacoj. Ja ne ĉiuj ne havas la donacojn. Kelkaj ege utilaj anoj de la komunumo ne tion havas sed ĝuas la fruktojn de la Spirito kaj tiamaniere priservas la komunumon.

En sia libro, Pastoro Donald Gee [ĝi] klare indikas ke la spiritaj donacoj ankoraŭ funkcias, alivorte rilatas la hodiaŭan tempon. Same li el la Biblio indikas, ke tiuj donacoj ne estas ordinaraĵoj homaj kapabloj, sanktigitaĵoj de la Sankta Spirito, sed male supernaturaĵoj, devenantaj rekte de Dio.

Pri la donaco de saĝeco, la apostolo klare distingas inter homa saĝeco

EVANGELIAJ KAJEROJ

kaj dia saĝeco. Saĝeco nepre ne estas universitata klereco. Eĉ analfabetulo (helpite de Dio) povas saĝe respondi. Saĝajn respondojn faris Jesuo, Jozef aŭ Daniel (Mat 21:25 ; 22:21 ; Gen 41:38 ; Dan 2:30).

Rilate la donacon scio same ne temas pri studebla aŭ legebla kono, sed pri io rekte el Dio. En libreto la sudafrica pastoro J. P. van den Berg rakontas pri iu Pachomus (293-348) kiu, post speciala preĝo, kapablis paroli la grekan kaj la latinan, ne lerninte ilin. La svisa evangelizisto Gschwend junaĝe venis al Suda Afriko, kaj multajn jarojn deĵoris en Basutoland (aŭ Lesotho). Li rakontas en sia *Lichtstrahlen* pri analfabeta nigrulo, kiu mirakle ricevis la legopovon por la Biblio.

Fido

Pastoro Gee enfaze diris pri fido, ke ne temas pri la ordinara ĉiutaga fido (ekz-e rilate la ĉiutagan manĝaĵon), sed pri speciala mirakla fido. Jesuo en Mar 11:22 kaj Mat 17:20 aludis al diro al monto, ke ĝi estu ĵetita en la maron. La pastoro miaĉeeste foje klarigis ke idiomprime temas pri problemo fariĝinta monto, kaj finis je io tia : "Ni ja ne deziras ke nia monto (la bela Tablomonto ĉe Kaapstad (Cape Town, Kaburbo)) estu forigata kaj ĵetata en la maron !"

La profeto Elija estis ekzemplo de tia fido kiam li, laŭ 1 Reĝ 18:19-38, havis preĝo- kaj fido-konkurson kun la profetoj de Baal kaj Aŝtar. Plenfide li verŝis abunde akvon sur la altaron kaj la oferaĵon ĝis ĉio estis unu granda kotaĵo.

Tuttago la baalaj pastroj ĝislaciĝe bleke petadis Baalon ekbruligi la oferaĵon kaj eĉ sin vundadis sed nenio okazis. Tiam per simpla mallonga preĝeto Elija petis Dion ekbruligi la oferaĵon. Momenton poste falis fajrego kiu konsumis eĉ ne nur la oferboston sed ankaŭ la ŝtonojn de la altaro kaj eĉ la koton.

Tiel (kaj tion) mirakla estis, ke Werner Keller, verkinto de la majstra verkaĵo *Die Bibel hat doch Recht* (La Biblio ja pravas) tamen scivolas, kiu forta nekonata ekbruliga ĥemiaĵo ekbruligis la oferaĵon. Mi respondas : Tiu mistera ĥemiaĵo nomiĝas la potenco de la Sankta Spirito.

Plenfide post tri jaroj da senpluveco Elija konsilis al la reĝo Aĥab

EVANGELIAJ KAJEROJ

urĝe ekveturi hejmen por ne tramalsekiĝi survoje, ĉar multa pluvo estas alvenanta kaj iom baldaŭ akvo je siteloj terenfalas, aŭ anglamaniere "pluvis katoj kaj hundoj". Ĉio ĉi tio pere de fidego.

Resanigo

Laŭ pastoro Gee, pro diversaj kialoj, tiu donaco multe estas dezirata. Kelkaj ege kompatas la malsanulojn kaj deziras resanigi la tutan homaron dum aliaj, kiuj neniam dum siaj vivoj famiĝis, deziras altiri almenaŭ iometon da atento al si (kaj opinias sin iom utilaj al Dio).

Ja multe okazas ke pastoro aŭ eĉ laiko preĝas apud malsanulo kaj ke tiu pro sia fido al Dio resaniĝas sed kiam iu havas la donacon de resanigo, tiu ofte nur tuŝas la malsanulon dirante: "estu sana" kaj je tio tiu ĉi tuj resaniĝas. Tion ĉi Paŭlo, Petro, Filipo kaj diversaj aliaj faris. Eĉ iliaj ombroj kaj tuŝo de iliaj vestaĵoj sanigis homojn. Pro tiuj signoj multaj atentis la predikon de la Evangelio. Elija, Eliŝa kaj aliaj same resanigis siatempe.

Tiu ĉi resanig-donaco, laŭ Pastoro Gee, havas ligojn nek kun psikologio, nek kun la kuraca profesio. Oni pere de hipnoto povas surdigi, lamigi, ktp. tutsanan personon kaj pere de hipnoto ree ĝustigi tiun sed oni ne pere de hipnoto kapablas resanigi difektitan orelon aŭ rompiĝintajn krurojn. Tio ja ne estas psikologiaj malsanoj.

La kuracisto povas engipsigi rompiĝintan kruron kaj la ĥirurgo povas kunkudri severan karnan vundon, sed post tio la natura resaniĝado de la apartiĝintaj partoj nepre okazu; io kio pro malforteco aŭ maljuneco, ofte ne okazas kaj jen ĉi tie la fida preĝo aŭ la homo kun la resanig-donaco devas fini la taskon de sindediĉa kuracisto aŭ ĥirurgo. Pro tio honesta kuracisto pli ol unufojon jam estas dirinta "Ni faris ĉion kion la kuraca scienco kapablas fari. Vi ek de nun fidu je Dio". Laŭ atestoj nombro da tiuj poste vere tutresaniĝis.

Mirakloj

Resanigo ja ankaŭ estas mirakloj sed ĉi-okaze temas pri "aliaj" mirakloj. La laŭlitera vorto, laŭ pastoro Gee, signifas "faroj de potenco" (aŭ povo), kiuj okazis en la tiama Eklezio de Dio.

Laŭ Agoj 1:8 Jesuo estas dirinta "Sed vi ricevos povon, kiam la Sankta Spirito venos sur vin..." En Agoj 9:40 Petro per "leviĝu !" revivigis Tabitan (Dorkas) kaj en Agoj 20:10 Paŭlo revivigis la mortfalintan Eŭtihan. Laŭ Agoj 5:15 la ombro de Petro falante sur malsanulojn ilin sanigis. En Agoj 13:11 Paŭlo diris al la kontraŭstaranta magiisto Elimas "Vi estos blinda... dum kelke da tempo" kaj jen okazis.

En la Malnova Testamento ankaŭ okazis multaj mirakloj : la bastono de Moseo, Jeriĥo, la manao, la trapaso de la Ruĝa Maro, de Jordano. Eĉ la samon pri Eŭfrato rakontas apokrifa libro.

Profetado

Plia donaco de la Sankta Spirito estas la profetpovo. Kelkaj homoj ja asertas ke profetado estas nur ordinara predikado, sed tio estas erara ideo. Kompreneble la bibliaj profetoj estis altgradaj predikistoj, sed predikantoj ne nepre estas profetoj. Inspirita predikado tamen ofte enhavas multan profetadon.

Ero el la profetpovo estas diri estontaĵojn. Agabo antaŭdiris grandan malsaton (Agoj 11:28), same Eliŝa (2 Reĝ 8:1). Agabo profetis en Agoj 21:1 ke Paŭlo estos ligita en Jerusalemon.

Multaj homoj opinias ke la profeto nur parolu "edifon" al la eklezio. Laŭ diversaj verkistoj, krom la estonteco, la profeto devas speciale atentigi pri mondamo, sekretaj pekoj kaj similaj aferoj. En la Malnova Testamento la profeto kelkfoje atentigis eĉ la reĝon. Sed kion nuntempaj profetoj faru tiurilate kun la nunaj ŝtatestroj ?

Nur kiam la malĝustaĵoj en la komunumo estos ĝustigitaj, la profeto komencu "edifi". La profetado ne okazas per lingvoj, sed pere de la loka lingvo.

Distingo de spiritoj

Pri tiu alia donaco ekzistas diversaj opinioj. Ĉe la pentekostanoj ĝenerale temas pri veraj spiritoj, kiuj ĉe la preĝkunvenoj parolas ion malkonvenan, ion maldecan, ion malan rilate la bibliajn instruojn, ktp. Ĉe aliaj kristanoj, tiu spirito pli multe temas pri persono, kiu ŝajnigas

sin ege pia "sanktulo" sed kiu vere estas hipokritulo kaj ruza malhonesta ŝtelisto. Foje psikologia bankestro tuj rekonas tian ruzulon sed multfoje nur la ulo kun la "distingo" kapablas legi la internon de la koro de tiu "spirito".

En 1 Joh 4:1-6 oni povas legi :

«Kredu ne al ĉiu spirito, sed provu la spiritojn (...) ĉiu spirito, kiu konfesas ke Jesuo Kristo venis en la karno, estas el Dio (...) kiu ne konfesas Jesuon, ne estas el Dio.»

Ankaŭ en 1 Kor 12:3 :

«(...) neniu parolanta en la Spirito de Dio diras : Jesuo estas anatemita ; kaj neniu povas diri : Jesuo estas Sinjoro krom per la Sankta Spirito»

(En la afrikansa traduko temas pri «nomi Jesuon malbenajo»).

Pro la nuntempa mondvasta disvastiĝo de spiritismo, la distingo de spiritoj estonte verŝajne ludos pli gravan rolon.

Lingvoj

Laŭ Agoj 2, la apostoloj restis en Jerusalemo atendantaj la ekaperon de la Konsolanto, kio subite okazis. Unue estis forta ekblovo de vento, kaj en la kunvenejoj aperis "disirantaj langoj kvazaŭ el fajro". Tiam ĉiuj komencis paroli aliajn lingvojn. Ĝuste tiam ĉiuj komencis paroli aliajn lingvojn. Ĝuste tiam la miloj da piaj hebreoj, kiuj de el eksterlande troviĝis en la urbo por la festo aŭdis la simplajn jerusalemanojn, kiuj ordinare nur konis la aramean kaj foje la grekan, flue paroli la lingvojn de iliaj naskiĝlandoj.

Ĉirkaŭ la komenco de tiu ĉi jarcento, sed ankaŭ pli frue en la antaŭa jarcento, pli-malpli la sama afero okazis multloke, ankaŭ en Sudafriko. En Soutrivier (Salrivero) apud Kaburbo, laŭ libreto de Past. van den Berg, oni ekvidis fajrajn langojn sur la koncerna preĝej-tegmento (kaj same aliloke). Diversfoje tiuj fenomenoj okazis en tradiciaj preĝejoj (kalvinana, anglikana).

Ofte, ekde la tempo de la apostoloj, tiom da homoj parolis en lingvoj, ke ne troviĝis ebleco predikadi kaj tiam la apostolo Paŭlo devis organizi bonordon. Li do severe ordonis ke ĉe publikaj kunvenoj, nur du aŭ tri

EVANGELIAJ KAJEROJ

uloj parolu en lingvoj, kaj nur se troviĝas iu(j) kiu(j) povas interpreti, t.e. havas la donacon traduki en la lokan lingvon. Alimaniere pro tiom da interrompoj estus neebla predikadi. En 1 Kor 14:26 Paŭlo klare diris ke «ĉio fariĝu por edifo». Tio ĝenerale estas la moro ĉe pentekostanaj eklezioj.

Antaŭ kelkaj jaroj oni pensis en Sudafriko pri permeso al pentekostanaj eklezioj ankaŭ partopreni en la perradia dissendado de Diservo, sed oni timis la tro oftajn «amen» kaj «haleluja», kaj eble la parolojn en lingvoj. Okazis kelkaj pentekostanaj perradiaj Diservoj, kaj mi ne aŭdis eĉ unu solan «amen» aŭ «haleluja», kaj ne eĉ unu tuseton aŭ unu bebploreton. Poste pastoro klarigis al mi ke oni uzas specialan mikrofonon kiu estas "surda" je sonoj plidistancaj ol duona metro.

Interpreto

La donacoj de profetado kaj de lingvoj multrilate estas egalaĵoj, sed nur se troviĝas interpretanto por traduki tiun perlingvan profetaĵon en la lokan lingvon. Ĝuste pro tio tiuj du aŭ tri kiuj parolas en la publika kunveno silentu se ne troviĝas interpretanto.

Tiu lingvo-kaj-interpreto estas signo por la nekreduloj. La profeto, eble klerulo en sia inspirita prediko avertas. La nekredulo do pensas pri elpensajo de klerulo kaj ne atentis. Sed, kiam estas lingvo-kaj-interpeto, li surpizite atentis.

En la historio

Post la ĉieliro de Jesuo la apostoloj, aliaj disĉiploj kaj kelkaj parencanoj de Jesuo, proks. 120, restis en Jerusalemo atendente la alvenon de la promesita Konsolanto. Pli ol semajnon ili preskaŭ daŭre preĝadis en la granda supra ĉambro kaj je la pentekosta tago, tio vere okazis laŭ Agoj 2 : aŭdiĝis bruo de forta vento kaj fajraj langoj malsupreniris sur ĉiujn kaj ili, kiuj ordinare parolis la aramean, subite parolis la lingvojn de la ĉirkaŭaj landoj kaj laŭdis Dion en tiuj.

Dum la unuaj kelkaj generacioj de la kristana epoko, tiu parolo en lingvoj estis grava ero de la kristana Diservo sed poste malpliigis kaj preskaŭ tute malaperis. Sed tamen jen kaj jen ripetiĝis ie dum la

jarcentoj. Foje estis en "ordinaraj" tempoj, sed foje ankaŭ estis dum tempoj de intensa persekutado, ekzemple de valdanoj, hugenotoj, grupoj kiuj ofte devis kaŝi sin en arbaroj kaj rokaĵoj, aŭ laŭ Heb 11:37-38 «ĉirkaŭvadis en ŝafaj kaj kapraj feloj (...) vagadis en dezertoj, sur montoj en kavernoj kaj kaŝejoj de la tero». Aparte de la parolo en lingvoj, la Spirito, laŭ malnovaj rakontoj, ofte avertis ilin pri la alproksimiĝo de soldatoj, kaj ili silente foriris. Ripete la soldatoj trovis nur freŝe forlasitan kaŝejon, sed nenium "herezulon".

La pentekostana vekiĝo

Dum la antaŭa jarcento en la skota okcidenta marborda regiono okazis granda pentekostana vekiĝo, kie la fratoj Mac Donald ludis gravan rolon, kun multe da parolo en lingvoj, profetado kaj interpreto en la gaelan lingvon, malŝatatan de la anglaj estraroj.

Dum la 20-a jarcento en multaj lokoj, eĉ en Hindio, okazis pentekostanaj vekiĝoj, kiuj ĉiurilate similis tiujn de la apostola epoko: homoj, aparte de la parolo en lingvoj, frapis la manojn, gaje kantante nekonatajn kantojn fremdlingve. Foje se troviĝis orgeno, iu, ne tion konante, eĉ muzikis kvazaŭ Beethoven ludis. Malamikoj interpaciĝis kaj malnovaj ŝuldoj pagitiĝis. Homoj saltis, dancetis, eĉ rulis sur la planko. Aliaj terenfalas kaj ŝajne duonkonscie longan tempon tie kuŝis.

Tio okazis diverslande, interalie en Britio, Usono kaj Sudafriko, sed ĉie estis la sama laŭtega brua miksaĵo de lingvoj, kantoj, manfrapo. Same kiel en la Pentekosta tago, Dio honorigis ĉiujn lokajn lingvojn kaj ne iun opiniis malaltvalora.

La britia vekiĝo forte "trafis" Kimrion, ordinaraĵ Diservoj diversloke ĉesiĝis. Juna kimro, Evan Roberts, mem ne celante tion, baldaŭ ludis gvidan rolon kaj vaste konatiĝis ekster sia lando. Tiu foje diris "Iu bonvolu iri eksteren. Dekstraflanke de la preĝejo troviĝas helpobezona virino". Ĉio kompreneble estis en la kimra lingvo. Kiam Evan Roberts, jarojn pli poste, mortis, la "eksterlandaj" ĉeestantoj de la entombigo aŭdis nur la kimran, sed eble la Spirito al multaj individue tradukis.

Ernst Ventner, Sudafriko
(mallongigita)

 Ernst VENTER (*fenter*), sudafrika pentekostano. Emeritulo. Li jam tradukis
 en Esperanton kelkajn misiajn broŝurojn.

LA HODIAŬA AGO DE KRISTO EN LA SANKTA SPIRITO

La promesoj de Kristo

Antaŭ sia ĉieliro la Sinjoro Jesuo Kristo lasis majestajn promesojn. Dum la historio, promesoj neniam estis eldiritaj kun tia potenco, kiel li eldiris tiujn ĉi, nek antaŭ li, nek post li. Vere, neniu ja povis paroli kiel Jesuo.

«Iru do kaj disĉipligu ĉiujn naciojn, baptante ilin en la nomon de la Patro kaj de la Filo kaj de la Sankta Spirito ; instruante ilin observi ĉion, kion mi ordonis al vi. Kaj jen mi estas kun vi ĉiujn tagojn, ĝis la maturiĝo de la mondaĝo» (Mat 28:19-20).

Ja tute klaras, ke Jesuo mortis sur la kruco, la trian tagon resurektis, kaj, post supreniro al la Patro, laŭ fizika aspekto ne ĉeestas inter ni sammaniere, kiel li iradis instruante homojn dum sia surtera vivo.

«Mi havas ankoraŭ multon por diri al vi, sed vi ne povas ĝin nun elporti. Tamen kiam venos li, la Spirito de la vero, li gvidos vin en ĉian veron ; ĉar li parolos ne de si mem ; sed kion ajn li aŭdos, tion li parolos ; kaj li anoncos al vi venontajn aferojn. Li gloros min, ĉar li ricevos el miaj kaj anoncos al vi. Ĉio ajn, kion la Patro havas, estas mia ; tial mi diris, ke li ricevos el miaj kaj anoncos al vi. Mallongan tempon kaj vi jam ne rigardas min ; kaj denove mallongan tempon, kaj vi min vidas» (Joh 16:12-16).

Kiel do jam li povis doni al ni tiajn promesojn ? Promesojn ke li estos kun ni kaj inter ni ? Se Kristo estus inter ni, ni tute normale povus

SANKTA SPIRITO, 20-A JARCENTO, KATOLIKA ĤARISMA MOVADO - SAINT-ESPRIT, 20^e SIECLE, MOUVEMENT CHARISMATIQUE CATHOLIQUE - HOLY SPIRIT, 20TH CENTURY, CATHOLIC CHARISMATIC MOVEMENT - HEILIGEN GEIST, 20STE JAHRHUNDERT, KATOLISCHE CHARISMATISCHE BEWEGUNG - ESPÍRITU SANTO, SIGLO 20, MOVIMIENTO CARISMÁTICO CATÓLICO - SPIRITO SANTO SANTO, 20^o SECOLO, MOVIMENTO CARISMATICO CATTOLICO -

EVANGELIAJ KAJEROJ

atendi tiujn mirindajn agojn, kiujn li faris proksimume antaŭ 2000 jaroj en Palestino. Kaj se tiuj mirakloj forestas, kiamaniere Kristo povas esti kun ni, ĉar ni ja scias, ke li sidiĝis dekstre de la Patro ?

La Konsolanto

Unue, la Sankta Skribo atestas ke Kristo estas inter ni en aspekto de "alia konsolanto".

«Kaj mi petos la Patron, kaj li donos al vi alian Parakleton, por ke li restadu kun vi por ĉiam ; tiu estas la Spirito de la Vero, kiun la mondo ne povas akcepti, ĉar ĝi lin ne vidas nek konbas ; vi lin konas, ĉar li restados kun vi kaj estos en vi. Mi ne lasas vin orfaj, mi venos al vi. Ankoraŭ iom da tempo, kaj la mondo ne plu vidos min. Sed vi vidos min, ĉar mi vivas, tial vi ankaŭ vivos. En tiu tago vi scios, ke mi estas en mia Patro, kaj vi en mi, kaj mi en vi» (Joh 14:16-20).

Kristo deklaris, ke li laŭ specifa maniero estos kun ni dum ĉiuj tagoj de la vivo. En tiu ĉi fragmento Jesuo Kristo al ni parolas, ke li estis "la unua Parakleto".

La vorto "Parakleto" aŭ "Konsolanto-Trankviliganto" havas multajn signifojn. En la greka lingvo, tiu ĉi vorto signifas tiun, "kiu estas alvokita por tio, ke konstante trankviligu". En tiu ĉi teksto de la Sankta Skribo, Kristo parolas pri si mem, kiel la "unua Konsolanto", alvokita por konsoli kaj helpi. Dume la Sankta Spirito estas "alia Konsolanto", kiu alvokitas konstante helpi al la Eklezio post la ĉieliro de Jesuo Kristo.

Kiam Jesuo troviĝis sur la tero, li estis la "unua Konsolanto" al siaj adeptoj. Li estis kun ili konstante, helpante al ili en ĉiuj cirkonstancoj de la vivo. Prepariĝante forlasi tiun ĉi mondon, al tristiĝintaj disĉiploj li diris, ke li ne lasos ilin orfaj, sed petos la Patron, kaj la Patro alsendos "alian Konsolanton".

En la greklingva teksto, tiuj ĉi vortoj sonas *allos parakletos*. Teologoj asertas, ke la vorto *allos* signifas "la sama en alia". Do, la Sankta Spirito estas samspeca Konsolanto, kiel la unua Konsolanto, li estas nur la tria perosno de la plej Sankta Triunuo. La Sankta Spirito

EVANGELIAJ KAJEROJ

elversigis dum la Pentekosta tgo kaj prenis la lokon de Jesuo Kristo, daŭrigante en lia nomo la saman agon ĝis niaj tempoj. Jen pro kio li estas *allos parakletos*, "alia konsolanto en la sama". Jen do tial, la ĉeesto de la Sankta Spirito estas la sama, kiel la ĉeesto de nia Sinjoro Jesuo Kristo inter ni. Jesuo ja diris :

«Mi ne lasos vin orfaj, mi venos al vi.»

Kaj ankaŭ li diris :

«Tiutage vi ekscios, ke mi estas en la Patro, dume vi en mi kaj mi en vi.»

Partopreno de la Sankta Spirito en nia vivo estas partopreno de Jesuo Kristo mem.

Hodiaŭ

Due, ni ekrigardu la agon de Kristo, plenumata en la Sankta Spirito :

«La Spirito de la Eternulo estas sur mi, ĉar li min sanktoleis, por bonanonci al malriĉuloj ; li sendis min por anonci liberecon al kaptitoj, por meti la vunditojn en liberecon, por proklami favorjaron de la Eternulo» (Luko 4:18-19).

Tio estas evangelia deklaro de Jesuo Kristo, kiu ĝuste diris, ke sian mision li plenumas en la sanktoleado de la Sankta Spirito. Kristo estas la Kapo, dum la Korpo (la Eklezio) restas surtere. La sama Spirito, kiu elversigis sur la Eklezion dum Pentekosto, videblas ankaŭ hodiaŭ. Ne estas bezonate diri, ke ni devus serĉi la saman Savanton kaj liberiganton Jesuon inter ni hodiaŭ, tial ke la Sankta Spirito, "alia konsolanto", estas tute la sama Konsolanto, kaj plenumas tute la saman agon, kiun plenumis Jesuo Kristo vivante surtere.

Hodiaŭ, eĉ ĉi-momente, dank' al la Sankta Spirito, la Evangelio estas anoncata al mizeruloj en la mondo, ankaŭ hodiaŭ resaniĝas spirite blindaj, ne malofte vidkapablon reakiras ankaŭ fizike blindaj. Elliberiĝas spiritaj malliberuloj, ĉar jam alvenis tempo de la Dia graco. La Sankta Spirito hodiaŭ multe agadas, disdonante la Kristajn donacojn al la surtera Korpo de Kristo, la Eklezio. Iutempe ja Jesuo Kristo anoncis la Evangelion en sanktoleado de la Sankta Spirito, dum hodiaŭ ĉiu membro de la Korpo de Kristo (la Eklezio) estas sanktoleita je la Sankta Spirito, por esti atestanto de la Evangelio. La Sankta Spirito laboradas pere de la Eklezio kaj plenumas la saman agon, kiun plenumis Kristo antaŭ

2000 jaroj en Palestino.

Trie, la libro de la Agoj de la Apostoloj estas ankaŭ verkata hodiaŭ. Iuj anoncas, ke la mirakloj finiĝis en la unua jarcento, tial hodiaŭ ne plu eblas atendi tiujn mirindajn aferojn, priskribitajn en la Agoj.

Tamen, ni atendu tion, kion la apostolo Luko skribas al Teofilo :

«La unuan historion mi faris, ho Teofilo, pri ĉio, kion Jesuo komencis fari kaj instrui» (Agoj 1:1).

Ĉi tie ni klare vidas, ke oni parolas pri la komenco de agado kaj instruado de Kristo, tamen en la Agoj eblas trovi nenion, kio atestus pri tio, ke Kristo jam finis sian agon kaj instruon. Jesuo Kristo daŭre agas kaj instruas pere de la Sankta Spirito.

«Kaj elirinte ili predikis ĉie, kaj la Sinjoro laboris kun ili kaj fortikigis la parolon per la signoj, kiuj sekvis» (Mar 16:20). Kaj jen, ĝuste la samaj agoj, kiujn komencis Jesuo Kristo, hodiaŭ estas plenumataj inter ni pere de la Sankta Spirito.

La Sankta Spirito estas kun ni poreterne. En la Sankta Skribo oni legas :

«Kaj mi petos la Patron, kaj Li donos al vi alian Parakleton, por ke li restadu kun vi por ĉiam» (Joh 14:16).

«Tamen kiam venos li, la Spirito de la vero, li gvidos vin en ĉian veron ; ĉar li parolos ne de si mem ; sed kion ajn li aŭdos, tion li parolos. Kaj li anoncos al vi venontajn aferojn. Li gloros min, ĉar li ricevos el miaj kaj anoncos al vi» (Joh 16:13-14).

Atentu, ke la Sankta Spirito prenas el la Sinjoro Jesuo Kristo kaj siavice montras al ni la ricevitan, montras al vi (ci) kaj mi.

Do, la agado de la Sankta Spirito inter la kredantoj daŭrigas la agadon de Kristo, kiun la Sinjoro Dio komencis antaŭ 2000 jaroj.

Ne videbla ?

Multaj homoj demandas : "Kial do ni ne vidas tiun agadon de Jesuo Kristo, kiu ripetiĝas inter ni ?" Nur pro tio, ke multaj kristanoj jam

zorgas nur pri aferoj korpaj kaj ne plu vidas kuneston de la Sankta Spirito, ili ne interesiĝas pri agado de la Sankta Spirito kaj tute ne penas akiri donacojn, kiujn donas ĉi lasta. Dume, la Sankta Spirito estas ĝuste la sama Konsolanto, kia estis Jesuo Kristo. Inter ĉi tiaj duonmortintaj kristanoj, al kiaj do agoj de la Sankta Spirito povas ankoraŭ prezentiĝi ?

La Evangelio de Kristo ne estas historia antikvaĵo. Ni nur priatentu admonojn de la epistolo de la apostolo Judas :

«Sed, vi, amataj, memoru la dirojn antaŭe parolitajn de la apostoloj de nia Sinjoro Jesuo Kristo ; nome, ke Li diris al vi : en la lasta tempo estos mokemuloj, irantaj laŭ siaj propraj voluptoj malpiaj. Tiuj estas la disigantoj, laŭinstinktaj, ne havantaj la Spiriton» (Jud 17-19).

Atentu vi la vortojn «ne havantaj la Spiriton». Tie kie forestas la Sankta Spirito, ne povas plene manifestiĝi ankaŭ la viva Kristo. Kiam vi ekvidos ĉeeston de la Sankta Spirito inter ni, kiam vi bonvenigos kaj akceptos tiun ĉi ĉeeston, kiam vi akceptos la Sanktan Spiriton, kiam vi absolute de li dependos, tiam vi ekvidos la agojn kaj instruon de nia Sinjoro Jesuo Kristo aperantajn en via persona vivo. Vi ekvidos kiel saviĝas la animoj, resaniĝas malsanuloj, estas forpelataj demonoj, estas ricevataj mirindaj respondoj al niaj preĝoj. Kristo sian agon ankoraŭ ne finis. Sian agon li daŭrigas inter ni pere de la "alia Konsolanto", la Sankta Spirito, *allos parakletos*. Kiel mi jam menciis, la Agoj ne estas finverkitaj. Ĝi estas verkata ankaŭ hodiaŭ, ĝin daŭre verkas la Eklezio kaj ties spirithavaj infanoj, la fideluloj. Kaj tiu libro estos verkata ĝis Jesuo Kristo realvenos.

Malsanoj

En nia epoko, formiĝinta en neordinara situacio de la tempo, homo kvazaŭ neatendite surpaŝas scenejon de la vivo, tamen same neatendite ĝin forlasas. Li trapasas la vivon ofte eĉ plene ne ekkoninte la celon de sia vivo, ne povinte respondi la demandojn de la ĉiutempaj pensuloj : de kie ni alvenis kaj kien ni iras. Homoj ĉiam estigas la demandon, ĉu ekzistas Dio, tamen unuj demandas por tio, ke ili povu trovi Dion, dum la aliaj por ke ili povu eldiri respondon per la vorto "ne". Por multaj homoj Dio ne estas bezonata. Pro kio ? Sperto de la Eklezio senerare respondas :

por ke homo, perdinta Dion, senĝene ekobeu la leĝon de la peko. Ja estas vero, ke dum homo ĉesas kredi Dion, peko fariĝas tute "ne reala" afero, ĉar la peko atestas pri senordaj rilatoj kun Dio. Kial do ni devas obei diajn ordonojn ? Kial ni ne povus anstataŭi ilin per pure homaj statutoj, reguloj, adaptitaj al tempoj de nia properanta kulturo, rifuzinte terminon de la peko, kaj ekestintajn malbonecojn de la malsanoj de la nuntempo.

Tamen ekestas demando : kiujn kuracmetodojn ni povus adapti dezirante eviti ĉi tiujn malsanojn ? Homaj rimedoj povas esti nur portempa ŝajnigo, ne ebliganta bezonatan resaniĝon.

Obei

En la Nova Testamento ni povas legi diece fortikan instigon de nia Sinjoro Jesuo Kristo : lin obei, lin sekvi, lin ekkoni.

«Tial ĉiu, kiu aŭdas ĉi tiujn miajn parolojn kja plenumas ilin estas komparata al saĝa viro, kiu konstruis sian domon sur roko» (Mat 7:24).

«Se vi observas miajn ordonojn, vi restas en mia amo, tiel same, kiel mi observis ordonojn de mia Patro, kaj restadas en lia amo» (Joh 15:10).

«Jesuo denove parolis al ili dirante : Mi estas la lumo de la mondo ; kiu min sekvas, tiu ne iros en mallumo sed havos la lumon de la vivo» (Joh 8:12).

Malgraŭ abunda kaj elokventa atesto de la Evangelio, en la persona praktiko oni devas renkontiĝi kun homoj, kiuj la tutan diecan instruon taksas sole per kritika, teoria menso, argumentante, ke, se Kristo, vivante surtere, atestis savon, konfirmante la vortojn per mirakloj, kial do hodiaŭ ĉio tio ne videblas okulfrape, senpere, kiel tiutempe ? Se Kristo lasis al siaj posteuloj potencon

(«Kaj jenaj signoj sekvos la kredantojn : en mia nomo ili elpelos demonojn ; ili parolos per lingvoj ; ili prenos en manoj serpentojn, kaj se ili trinkos ion mortigan, ĝi neniel difektos ilin ; sur malsanulojn ili metos la manojn, kaj ili resanigos» (Mar 16:17-18))

kial do hodiaŭ ni ne vidas ĉiujn tiujn signojn ? La serĉantoj de Dio postulas ne nur teorian ateston, sed ankaŭ praktikan pruvon, ke

«Jesuo Kristo estas la sama hieraŭ, hodiaŭ kaj ĝis eterneco» (Heb 13:8),
ke lia dieca potenco kaj agado ne ĉesis kune kun la ĉieliro, sed daŭras
ankaŭ hodiaŭ.

La Movado de la Spirita Renoviĝo

Mi volus opinii, ke ĝuste unu el la vojoj, rimedoj, kaj eblecoj reale respondi similajn problemojn estas la **Movado de la Spirita Renoviĝo**, precipe intime rilatanta kun la influo de la Dia graco, povanta atesti tiun influon ankaŭ per ekstera, praktika, konkreta metodo, per esploro alirebla al niaj sensoj, ke la nekredantoj kaj dubantoj

«ekobeu vorte kaj fare, en la potenco de signoj kaj mirindaĵoj, en la potenco de la Sankta Spirito» (Rom 15:18-19).

La Sinjoro Dio ĉiujn alvokis esti parteto de la Movado de la Spirita Renoviĝo. Tio estas movado, kiu en Litovio paŝas la unuajn, malfacilajn paŝojn. Multaj personoj hodiaŭ devas vere heroece agi por tiu ĉi celo: la Eklezion en Litovio revivigi, spiritigi, altiri en ĝin ĉiam pli kaj pli da membroj, sed ne detruiri, de kio, ofte tute sen kaŭzo, ni estas akuzitaj fare de homoj malbonvolaj kaj ne sciantaj la veron. Iu ajn faro de Dio ne estas facila. Ni renkontis kaj renkontos multe da kontraŭago. Tamen ĝuste tio povas esti por ni aldona argumento, ke niaj decidiĝoj estas ĝustaj kaj veraj, ke la agado de la Sankta Spirito, per mirinda forto manifestiĝanta en aliaj landoj, ne preteriros ankaŭ Litovion.

Multaj konas eĉ ekstremajn kazojn de kontraŭo de la pastroj. Tiuj ĉi misprezentas faktojn, kreas ne okazintajn aferojn, ili eĉ nin malbenas kaj penas per ĉiuj eblaj manieroj ruinigi nian agadon. Tamen tie, kie Dio mem aldonis Sian manon, afero ne detruoblas. Ni forte kredas tion, plej multaj el inter vi ankaŭ tion kredas.

Ni ne povas halti pli longe ĉe ĉiuj tiuj problemoj, por tio mankas tempo, ni nur koncize ekzamenu kio estas tiu movado mem, ĉar ankaŭ pri tio plej multaj tute malmulte scias.

Ni menciis, ke la Sinjoro alvokis multajn aliĝi la Movadon. Tio ne signifas, ke ili en ĝi akiros iun ĥarisman donacon kaj trankvile plu vivos nur por si mem. Estas malĝoje, ke tamen tiaj kazoj jam ekzistas.

Envere do la Diajn donacojn akiritajn pere de la Movado ni devas senlace disdividi kun aliaj, servi al aliuloj kaj konduki ilin al Kristo. Ne konsciinte tiun ĉi aferon, ne eblas esti bona membro de la movado, kaj ne eblas agi en ĝi sukcesplene.

Eklezia renoviĝo

La Movado ne estas destinita nur por persona sankteco. Ni povos plej bone ĝin difini konsciinte, ke en la nuna historia etapo, en kiu ni vivas, Dio elverŝas Sian Sanktan Spiriton, por ke renoviĝu la Eklezio. Dio tion volas. Li faras, ke Lia Eklezio estu renovigata, aŭ alivorte, Dio sin turnas al la Eklezio invitante ĝin esti tia, kian Li volas.

Ni povas diverse klarigi kia estas tiu plano de Dio. Komence ni parolis pri la neceseco aparteni al la Eklezio. Kio ĝi estas? Ni povas apliki diversajn difinojn, ekz-e *Eklezio*, tio estas *Familio de Dio*, *Popolo de Dio*; *Eklezio*, *ŝafoj de Kristo*, *rilatado en Dio*, ktp. Do ni povas diverse klarigi por ni kio estas la Eklezio.

En la instruo de la Eklezio mem la plej ŝatata difino estas la *Eklezio* kiel *Korpo de Kristo*. La samon eldiras ankaŭ la apostolo Paŭlo. Mi aŭdacas aserti, ke la Movado de la Spirita Renoviĝo en la Eklezio estas nova, moderna Pentekosto, la nova elverŝo de la Sankta Spirito, por ke la Eklezio envere estu Korpo de Kristo.

Kion tio signifas? S. Paŭlo diras ke la Eklezio devas rememori nian homan fizikan homan korpon. Rigardante la homan korpon ni vidas, ke ĝin konsistigas diversaj membroj: piedoj, manoj, trunko, okuloj, oreloj, nazo, koro, stomako, tamen neniu el inter ili vivas por si mem.

Kuraci la korpon

Foje okazas en korpo, ke io vivas por si mem, tute ne servante al aliaj membroj. Tiam ĝi iĝas frenda korpo, absolute egoisma ero. Se iu havas ion similan en sia korpo, kuracistoj tion nomas tumor aŭ kancero. Tumoroj de ĉiu tipo, tio estas plenumantoj de egoismo en la komuna korpo. Se tiu ĉi kancera memamo ne estos neniigita tiam ĝi mem neniigos la tutan korpon.

La Dia plano enhavas tion, ke ni vivu kiel harmoniaj membroj de la

monolita organismo. Nek unu el inter ni povas iĝi kancera tumor. Koincide kun Dia plano neniu rajtas vivi nur por si mem, ĉar la plej granda peko estas egoismo. Tion ĉi devas primediti la pli aĝaj, sed precipe la junaj partoprenantoj de la Movado. La hodiaŭa edukado ofte kondukas la junularon al senbrida egoismo, severa malhavo de amo al proksimulo, vivo nur por si mem, ne kompreno kaj ne deziro kompati, helpi, kompreni. Estas certa kvanto da dezirantoj krei sur tiu ĉi tero absolutan paradizon.

Unu el inter la plej gravaj taskoj de la Movado estas senprokraste operacii tiajn tumorojn, ke ili resaniĝu mem kaj ne mortigu aliulojn. Ni estas konvinkitaj, ke la Movado de la Spirita Renoviĝo en la hodiaŭa mondo estas la plej efektiva rimedo por kuraci tiajn malsanojn. Se ni ankoraŭ plene ne malkovris ĉiujn kuracilojn, kredu, ili estos malkovritaj baldaŭ.

Jesuo venis instrui nin, ke ni vivu nur por ni mem. Jesuo venis diri al ni, ke ni devas morti por ni mem kaj vivi por li, vivi por lia korpo, t.e. unu por la alia. Ni ja estas lia korpo. S. Paŭlo en la 1-a epistolo al la Korintanoj, en la 12-a ĉapitro, parolas pri la agado de la Sankta Spirito. La samon li memorigas en Romanoj 12, en Efesanoj 4. Ĉion ĉi tion kunmetinte ni trovas ke la Sankta Spirito el ĉiu el inter ni faras iun ajn membron, ke ni servu al la korpo. Ĝi donas al ĉiu iun ajn donacon, sed neniu posedas ĝin por si mem, por kontentigi la propran egoismon. La Sankta Spirito agas tiel, donante malsamajn donacojn, ĉar ni ĉiuj ja estas unu Korpo. S. Paŭlo daŭre klarigas esencon de tiu ĉi formulaĵo dirante, ke okulo ne aŭdas, orelo ne vidas, tamen orelo bezonas okulon por plenumi ĉion, kion ĝi mem ne povas fari. Kaj li klarigas plue, ke, se ĉiu membro estus la sama, la korpo ne povus funkcii normale. Malsamaj membroj de la korpo plenumas malsamajn taskojn. Tia estas la plano de Dio. Jesuo sopiras havigi al ni sian Spiriton, ke pere de tio li faru el ni ĉiuj unu korpon.

Unu eklezio

Dio sopiras vidi sian Eklezion unu, kaj tion postulegas de ni. Sur la kruco Jesuo rericevis por ni plenan savon, akiris por ni ĉion, kio estas bezonata, por ke ni vivu kiel infanoj de Dio, infanoj de Amo, tamen li preĝis ankaŭ por tio, ke ni ĉiuj estu unu. Se Dio al iu ajn unu estus

doninta ĉion, tiu homo ne povus kompreni la veron, ke li bezonas alian homon. Li bezonas alian homon ne apud botelo, ne por ludi kartojn, ne por kuniri en bierejon, ne por la lito de malĉastado, ne por ricevi utilon, ne nur por krei familion, sed por la spirita rilatado, por la edifo de si mem kaj de aliuloj, por la servado al aliuloj.

Jes, Jesuo ĉion akiris por ni sur la kruco, tamen unu parton de la akirita riĉaĵo li donis al ni, alian al vi.

Unusola vojo, per kiu ni povas atingi plenecon, tio estas reciproka unuiĝo. Unusola vojo por atingi la savon, tio estas kolektiĝi en komunumon kaj vivi kiel unu korpo. Granda eraro fortikiĝas, kiam homoj, ricevinte Diajn donacojn, anstataŭ konstrui la Korpon de Kristo kaj servi al li, tute ne plenumas ĉion ĉi tion. Ili memorigas la homon el la parabolo, kiu ricevinte talenton ne ĝin utiligis sed subfosis en teron, ĉar li zorgis nur pri si mem kaj faris nenion por la Sinjoro Jesuo Kristo. En la Movado oni havas eblecon akiri forton por la sanktiĝo, por grandaj laboroj Diaj, ĉar la Spirito de Dio siajn donacojn disdonas al ĉiu membro de la Eklezio.

Certaj membroj de la Eklezio havas misan, eraran "humiliĝon", kiu nur maskas ilian pigremon. Tiaj nur skuas sian kapon kaj diras: "kion mi povas fari ... mi nenion kapablas". Poste ili ŝlosfermas sin en sia hejmo, ĉar ili ne volas servi al la gefratoj. Ili povas nenion bonfari, ĉar "ne kapablas; kion mi povas?" Ni devas utiligi niajn donacojn, ĉar ni ricevis ilin el la Sankta Spirito. Eble vi ne havas belajn okulojn, eble via longa nazo ne estas bela, tamen vi ja povas per ĝi flari florojn kaj tiamaniere plenigi vin per ĝojo.

Ĉiu membro de la Korpo de Kristo en plano de Dio estas destinita al la tuta korpo, kaj, se ĉiuj ĉesus esti pigruloj, se ili mortus por si mem kaj ne permesus, ke disvolviĝu kancero en la komuna korpo de ni ĉiuj, tiam nia korpo akirus mirindan vivon, vivon de Kristo; ĝi estus vera Korpo de Kristo, kaj ĝuste tia devas esti la Eklezio, tia devas esti la Movado de la Spirita Renoviĝo kaj ĝi devas siajn membrojn direkti ĝuste al tio.

Estiĝas demando: Kiel ni mem povas fordoniĝi al agado de la Sankta Spirito, liberiĝi el la materieco, renoviĝi?

EVANGELIAJ KAJEROJ

La hodiaŭa Eklezio havas mirindan respondon por solvi tiujn problemojn, nome la renoviĝon en la Sankta Spirito pere de la Movado de la Spirita Renoviĝo.

Ĝuste samspeca movado ekzistas en Litovio. Verdire ĝi ne estas ankoraŭ tro disvastiĝinta, tamen, dank' al la Sankta Spirito, ĝi disvastiĝas. Speciala Diservo por la membroj de la Movado okazadas ankaŭ en la preĝejo de mia paroĥo ĉiusabate tagmeze. Do, ankaŭ vin ĉiujn, dezirantajn renovigi vian vivon en la Sankta Spirito, iĝi spiritaj homoj kaj feliĉaj en Jesuo Kristo, Dio invitas vin ekvidi la agadon de la Sankta Spirito. Li volas fari el vi novajn homojn en Kristo Jesuo. Amen.

Valerijus Rudzinskas, Litovio
kun Angele Judickiene
aperinta en *Ekumenismo*, 16, sept. 1989
kaj parte en *Espero Katolika*, 1989/10
adaptita

EVANGELIAJ KAJEROJ

LIBERECO EN LA NENECESA...

Oficiale ekumene

Antaŭ kelkaj monatoj, en ekumena kunveno mi partoprenis kiel oficiala reprezentanto de l' Remonstranta Eklezio, kie mi pastoras. Estis kunveno de du episkopoj Romkatolikaj, pluraj pastoroj de l' Reformita Eklezio kaj de la Nederland-Reformacia Eklezio (kalvinanaj), kaj de l' menonitoj. Oni parolis pri la reciproka partoprenado aŭ ne (pli ne ol jes) en celebrado de la Sinjormango.

Surbaze de mia plej profunda konvinko, kiu hazarde koincidas (aŭ eble ne tute hazarde) kun remonstranta tradicio de post la 17-a jarcento, mi enfazis, ke neniu eklezio miakomprene havas la rajton malpermesi al kiu ajn homo ke tiu partoprenu la manĝadon kaj trinkadon de Pano kaj Vino. Ĉar ja ne temas tie ĉi pri propra eltrovaĵo de individua eklezio, sed pri afero el la epoko antaŭ la estiĝo de Kristanismo mem, nome ĉe la Sinjormango invitas nin sole nur la Sinjoro mem. Tio estas: nur Jesuo invitas, la ĉeestantaj (kaj eventuale oficantaj) homoj (estas hazarde, kiuj fakte ili estu, ĉu pastroj, pastoroj aŭ iuj ajn laikoj) estas nur rimedoj pere de kiuj Jesuo nin nuntempulojn ĉiam ankoraŭ estas invitanta.

Oni ne akceptis mian vidpunkton, trovis ĝin "interesa", bonkondukta esprimo por indiki, ke fakte taksas ion tute negrava, kaj pluiris al la sekva punkto de la tagordo.

Ĉetable ekumene

Poste, kaj tio estas unu el la ĉarmaj flankoj de l' ekumeno, ni iris kun al la ĉina restoracio ege bonkvalita, kie ni tagmanĝis tre simple (nur unu pladon: ĉu nur kokino, ĉu porka viando, laŭelekto) kaj en neniel oficiala etoso povis plubabili inter ni. Kaj ĝuste tiaj neformalaj interparoloj ofte fariĝas la plej interesaj, ĉar en la oficialaj kunvenoj la delegitoj kutime eldiras nur tion, kion ilia eklezia tradicio demandas kaj atendas de ili.

DOGMO - DOGME - DOGMA - DOGMA - DOGMA - DOGMA -

Tie estiĝis priparolo pri tio, ke, laŭ kelkaj "iluminitaj" gravuloj, fakte io tia kiel nia liberal-kristana eklezio ne plu necesas : ja estas la toleremo religia ĉie nuntempe tiel kutima kaj enradikiĝinta, ke propra ekzistado de emfaze kaj principe liberala eklezio ja ĉiel estas superflua. Nu, mi afable ridetis, tion aŭdante. Kial ne ?

Alia samtablano (preskaŭ ĉiuj estas nur viroj : ja hazarde ĉu ne, en mondo kie ĉiuj homoj estas jam delonge tute egalaj, ĉu viroj aŭ inoj, ĉu ne ? almenaŭ laŭ mia kunparolinto ĵusa) informiĝis ĉe mi, ion sinkline, ĉu laŭ mi persone ne same superfluigas intertempe la liberala kristana movado...

Mi neis tion. Miakomprene, mi diris, la remonstrantoj estas ĉiam ankoraŭ vivnecesaj por la kredindeco de kristanismo entute. Tion mi diris kun eble ioma troigo, sed foje troigo necesas, se oni intencas kapti ies atenton.

Kial ? estis la reago. Mirplena.

Nu, mi diris : antaŭe mi pastoris sur la preskaŭ mezepokeca ideo, ke pravas nur unu sola eklezio, nome la Nederland-Reformacia, laŭ reformitaligo-interpreto... (por eksteruloj mi klarigu : dimanĉe dufoje preĝejen por Diservo ege daŭra kun kantado nur plennota de nur psalmoj rimitaj ; dimanĉe viroj kaj virinoj kaj eĉ la infanoj ĉiuj senescepte vestitaj en nigra, blanka kaj griza, nur eksterdomiĝante por iri preĝejen, eĉ infanetoj plej senkulpe junaj ne rajtas ludeti ekstere dum la Tago de l' Sinjor'. Virinoj, ja eĉ knabinetoj en la preĝejo kaj eĉ jam survoje al ĝi devas surhavi surkape siajn ĉapeletojn ; virinoj nenion rajtas decidi eĉ dumsemajne : decidas ĉiam nur la viro ; ktp. ktp. Entute : vivstilo ege rigore regulita, ne taŭga por la nuna mondo.)

Nu diris mia kuntablano : tio ja estas escepta kazo, preskaŭ nenie tio plu ekzistas. Nuntempe en ĉiuj eklezioj ĉiuj homoj povas tute libere diri kaj kredi kion ajn. Do kial ankoraŭ necesus tia eta liberala eklezio via ?

Mi iom ridete aldonis : ĉu vi ne legis pri la "proklamo de Kolonjo" (Köln) de Rom-katolikaj teologoj, kiuj pledas por iom pli da libera pensebleco ? Kaj pri la kuria reago al ĝi ?

Liberalismo ?

Tion li devis koncedi, sed tamen... fundamente ja... ĉu ne, en ĉiuj eklezioj dogmoj neniel pli grave rolas. La homoj nuntempe ja estas ankaŭ spirite adoltaj... Ili mem decidas kion kredi, kion ne... Do refoje : Kial ?

Fine, ĉar min tio vere eknaŭzis, mi diris : Nu, eble estas tamen io speciala : ĉe vi, en la t.n. grandaj eklezioj oni nuntempe eble ekhavas ĉiam pli la rajton pensi mem, nu bone. Sed samtempe : jen la granda diferenco : ĉe ni neniu ricevas la rajton pensi mem pri sia religio. Ni simple pensas mem, decidas mem, ĉiu el ni. Por vi estas eble io grava, ke certa teologo povas vortigi sian dubon pri tio, ĉu Jesuo vere korpe resurektis aŭ ĉu ne. Sed ĉe ni, se iu levus tian demandon, la granda plimulto simple mirus : Kial starigi tiajn negravajn demandojn ?

Ne grave ?, li diris, mirplena.

Jes, ne gravas. Laŭ nia tradicio en la fido ekzistas ege multaj aferoj kiuj ne estas centraj, sekve ne serioze gravaj : pri tiuj ĉiu ajn rajtas pensi kaj kredi laŭ sia plaĉo. Kiel Dio donas pensi al homoj. Pri tio neniu el ni pretas juĝi koncerne aliajn homojn. Ja estas nur ege malmultaj aferoj, kiujn ni vere konsideras gravaj, sufiĉe gravaj por diri : jen en tio ni serĉas unuecon. Nia slogano de jarcentoj ja estas : Unueco en la necesa, Libereco en la necerta, en ĉio la Amo.

Bona slogano, oni komentis ; mi ĝin tuj akceptus. Ĉu fakte ĝi ne devenas eĉ de Aŭgusteno ?

Povas esti, mi replikis. Sed ĉe ni ĝi estas tradiciaĵo. Jam delonge. Pluraj ekleziaj revuetoj lokaj ĝin portas slogane sur la eksteraĵo.

Nu, sed mi ankoraŭ ne vidas, kie estu serioza diferenco inter la via kaj mia eklezio, diris Rom-katolika pastro en nigra sutano. Ankaŭ ĉe ni kelkaj homoj opinias malsame pri neĉefaj aferoj...

Grava punkto ?

Bone, sed eble estas kelkaj por ni neĉefaj aferoj, kiujn vi opinias

gravaj.

Diru ekzemplon, li petis.

Nu, ekzemple : kia estas Dio ? Por ni tiu demando eble estas interesa por speciala diskutrondo, sed nepre ne sufiĉe interesa por komunuma vespero de l' loka paroĥo. Kia estas Dio ? Nu, la bildo kiun oni formas al si pri Dio ne estas in ter la necesajoj, niatradicie. Kelkaj pastoroj, por doni ekzemplon, deiras en sia predikado de l' praa ideo de Dio kiel Triunuo, nu bone : se tion ili kredas sincere : neniu tion kontraŭus ; aliaj, la plimulto, kompreneble neniel traktos pri Triunuo. Por ni Dio estas simple nur Dio, nekomparebla al kiu ajn homa bildigo. Same kiel por la plimulto de l' eklezianoj niaj. Por ni la demando pri Triunua bildo aŭ ne, rilate al nia kredo je Dio, nia fido je Dio, estas tute komplete malĉefa afero. Sekve same statas pri multaj aliaj aferoj, pri kiuj en la klasika, greka periodo interkverelis la koncilioj sub gvido de imperiestroj : ĉu Jesuo estas nur homo, aŭ ĉu en li enestas ankaŭ io Dia ? Stranga demando, sen multa rilato al mia fido je Dio. Por mi tio estas afero tute sen ajna graveco religia. Ja povas esti demando kiu filozofie gravas, sed religie absolute neniel. Kelkaj kristanoj konsideras Jesuon Dio. Por mi persone, kaj mi kredas por multaj remonstrantoj, tia eldiro limas je blasfemo : Dio sola estas Dio. Tio estas akceptebla. Sed Jesuo, Dio ? Fu... Same pri la Sankta Spirito (se uzi majusklojn) : ĉu temas pri ontologia ento ? Estad-science reala ? Por mi, kaj por multaj, jen ree demando religie neniel interesa.

Eble kelkaj el niaj legantoj komprenas, ke por pluraj ĉeestantaj gekomunumanoj miaj eldiroj sonis ne-kutime en la orelojn. Sed pli poste mi aŭdis, ke aliaj tamen opiniis ke estas bone, ke ankaŭ tia eble ne tute tradicia vidpunkto kristana estas aŭdata... Ĉar kristana ja estas nia eklezio. Absolute jes ! Sed ne dogmena. Aliflanke, se iu persone kredas je certaj dogmoj, ankaŭ je Triunuo, je Dieco de Jesuo, je du naturoj en Jesuo, je la Sankta Spirito kiel patrino de Jesuo (kiel siatempe asertis siriaj kristanoj en la klasika periodo) aŭ kiel sendita de Jesuo kaj Dio la Patro kune (kiel hereze laŭ la ortodoksiaj eklezioj asertas la Romkatolika eklezio kaj pluraj aliaj...) ... nu, se iu persone kredas je certaj dogmoj, neniu inter ni tion iel ajn kontraŭus. Kompreneble ke ne. Libereco en la necerta...

En dogmena KELI ?

Eta persona postnoto : el ĉi tiu eseeto la leganto verŝajne povos kompreni, kial mi ne fariĝas membro de KELI, ne ĉar mi ne ŝatas kunlabori kun ĝi ; volonte ja tion mi faras, per kontribuaĵoj de temp' al tempo en la revuoj *Dia Regno* kaj *Evangeliaj Kajeroj*, kaj per mia eldonserio *Voĉoj Kristanaj*, en kiu aŭdeblas diversaj flankoj de kristanismo. Sed ĉar KELI en sia baza deklaro akceptas Jesuon en multe tro emfaze dogma maniero ol ke mi persone tion povus subskribi. Same statas pri la eldiroj pri la Biblio kiel Vorto de Dio (statuto 1.2). Sed mi ja konfidas, ke la nuna mondo atingis intertempe tian stadion, ke tio ĉi neniel devos malhelpi nin reciproke subteni unu la aliajn en nia laborado por kristanismo kaj internacia interkompreniĝo helpe de Esperanto.

Gerrit Berveling (Nederlando)

Gerrit BERVELING [Berit], nederlandano (1944), fakulo pri klasika filologio latina kaj helena, teologo, esperantisto depost 1972, pastoro en la Remonstranta Eklezio, kunlaboras en diversaj revuoj, eldonas la serion *Voĉoj Kristanaj*.

LA PERANTA DIO

Recenzo : *The Go-Between God : The Holy Spirit and the Christian Mission*
/ John V. Taylor. - London : SCM Press Ltd, 1972.

Antaŭ preskaŭ dudek jaroj aperis en Britio libro, kiu ne estigis la jam brilan reputacion de la verkinto, poste anglikana episkopo de Winchester, sed kiu certigis ĝin. Por teologiaj studentoj kaj spertuloj en anglalingvaj landoj, la libro iĝis klasika, kaj eĉ hodiaŭ la verkinto ricevas leterojn dirantajn, ke ĝi ŝanĝis la vivon de la leginto.

La subtitolo tradukiĝas "La Sankta Spirito kaj la kristana misio." «La ĉefa aktoro de la historia misio de la kristana eklezio», komencas la aŭtoro, «estas la Sankta Spirito. Li estras la tutan aferon» (Agoj 1:4-5, 7-8). La Sankta Spirito devas esti la centro «de niaj pensoj pri Dio kaj pri la homaro, tiel, ke pensante pri Dio ni pensu unue, ne laste, pri la Spirito.»

RUAĤ

La Spirito kiu centras la teologion de S. Paŭlo, laŭ la aŭtoro, estas la sama kiun la Malnova Testamento nomas la Spirito de Dio, la Spiro de Dio, RUAĤ. La rilato de la Spirito al kristano kaj al la eklezio estas senprecedenta ; sed la Novtestamentaj aŭtoroj neniam ŝajnas supozi, ke, antaŭ ilia unika sperto, la Spirito estis tute nekonita.

En ĉiu homo RUAĤ estas la povo de la personeco, lia alieco, lia rekonebleco kiel li mem ; sed ĝi estas ankaŭ lia povo rekoni, suferi, la aliecon de la aliaj. Ekzistas vido kiu estas, ne rigardo, sed renkonto, interkomunikado ; tiu estas ofte grupo-sperto ; tius povas ŝanĝi la pensmanieron, ŝanĝi la vivon. Por kristanoj,

«la Sankta Spirito estas la nevidebla peranto, kiu staras inter mi kaj la alia, konsciigante nin unu la alian. Unue kaj ĉefe li malfermas miajn okulojn al mia frato en Kristo, al la najbarhomo, al la bezonkrizo, al la korfenda krueleco kaj la egale korfenda beleco de ĉi tiu mondo. Li donas tiun profetan vizion, sen kiu la popolo fariĝas sovaĝa (Sen 29:18).»

Amo-konscio

Li kreis kaj kreas, ĉar la universo kreiĝadas kaj respondas, unu parto al alia ; li stimulas, eĉ en la nehoma universo, iniciaton, elekton kaj sinoferon.

«Lia praforto superas ĉiujn aliajn fortojn ; ĝuste ĝi nomiĝas la forto de la amo, sed tio ne moderigas ĝian intensecon, nur grandigas terure nian takson de la fervoro de la amo.»

En la praepoko de la hebrea historio tiu vento neprognozebla kaptis homojn, laŭ la atestaĵoj, kiel ekposedo, produktante provizoran staton de ekstazo. Tiu forto inspiris metiistojn, fortigis heroojn, interpretigis sonĝojn, malkaŝis sekretojn, per speco de scio kiu fontas el la nekonscia menso kaj grupmenso. La movo de la Sankta Spirito ne estas identigebla kun la ŝpruco de la nekonscio ; sed per tiu ŝpruco li ofte agas.

«Neniam ni povas rekte konscii la Spiriton, ĉar en ĉiu renkonta kaj rekona sperto li estas ĉiam la peranto kiu kreas la konscion ... Pro tio, preĝoj faritaj al la Sankta Spirito estas nekonataj en la Biblio, kaj estis maloftaj en la praa eklezio ... Neniam vi povas koni la aliecon de la Sankta Spirito, nur per la vivecon kiun alportas lia ĉeesto, la inercion kiun alportas lia foresto. Li agas anonime kaj neperceptate ...»

Ni rekonas konscie la Spiriton,

«ne per la senĉesa premado de lia ĉeesto, sed per apartaj renkontaj momentoj kiujn li ekestigas.»

Al homoj en ĉiu epoko, kiaj ajn estas iliaj kredoj, li donas la neatenditan malfermon de okuloj, la profundan konscion de la alia (Dio aŭ ne-Dio), la nerezisteblan kreskon de forto, la duoblan vidadon de la estanta kaj de la ebla, la alvokon al sinofero, la donacojn de profetpovo, de preĝpovo, de resanigo, de ekstazo.

Sed se la Spirito movas en la nekonscio kaj per ĝi, kiel ni povas distingi lian agadon disde la nure sensama aŭ la demonia ? Ni devas rememori, ke li estas la Spirito de Vero (Joh 16:13) ; li invitas kondiĉe, ke ni fidelu al la vero de nia esto kaj de la esto de aliaj. Kaj ĉiam li fingromontras Jesuon kaj faras, ke ni vidu Jesuon klare.

Tio, kion Jesuo posedis, estis novspeca rilato kun la Spirito. La aŭtoro klarigas detale kiel Jesuo vivis Spiritplene, malfermis al ĉiuj siajn okulojn kaj sian koron, postuladis elektojn, mortis sinofere.

reviviĝis per la Spirito (Rom 1:3-4 ; 8:11 ; 1 Tim 3:16 ; 1 Pet 3:19). Kaj rekte rezulte de tiu morto kaj revivigo, venis al elverŝo de la Spirito kiu ekfaris distingeblan, unikan societon unuigitan per tute novspeca vivo kaj amo. Kiam la anoj de tiu nova kunfrato parolas pri la Sankta Spirito, ili parolas evidente ne pri momentoj de ekposedo sed pri daŭra ĉeesto.

«La aŭtoro de la Agoj,» diras John Taylor, «montras tre klare, ke vivi sub la gvido de la Spirito estas malfermi sin al la plej neatenditaj eblecoj.» La Spirito kapablas plenigi kredantojn je dua fojo (Agoj 4:31) ; nur post konfirmacio de konvertitoj jam baptitaj (8:14-17) ; aŭ antaŭ bapto kaj eĉ antaŭ peto pri bapto (10:44-47) ; kaj la donaco de la parolo per lingvoj foje venis kune, foje ne. «La Spirito ne volas kaj ne povas ligiĝi.»

Konsentite, la Eklezio de hodiaŭ kaj eĉ de Agoj 6:1

«ne aspektas, kiel tiu, kiu proponas al la homaro, per la povo de la Sankta Spirito, sekretonn, en kiun anĝeloj deziras enrigardi» (1 Pet 1:13 ; «starantaj piedpinte pro ekscito», aldonas John Taylor).

Sed «la vivo en la Spirito estas la antaŭ-gusto, ne la plenguo, de la nova mondo» (Efe 1:13-14) ; la hodiaŭa estas neplenumita, la estonteco estas garantiita.

«Saviĝi estas scii, ke oni estas akceptita pro Kristo, ne pro sia perfekteco ... Ne pro nia plia virto ni estas ekposeditaj de la Spirito, sed pro nia malfermiteco unu al aliaj en la nomo de Kristo.»

La dua parto de la libro, preskaŭ tiel longa kiel la unua, detalias kiamaniere kristanoj povas kaj devas, per la Spirito, vivi en la mondo la Spiritplenan vivon. Ĉiam John Taylor reliefigas

«la neordinaran konscion pri la aliaj, kaj sinoferon por la aliaj, kiujn donas la Spirito.»

Ekzemplaj rimedoj estas propetaj preĝoj kiuj estu silentaj ekzercoj de konsciado de Dio kaj de aliaj en Dio, domgrupoj de kristanoj «en kiuj nekristanoj sentu sin hejme», kaj malkaŝema dialogo kun nekristanoj : ĉar ĉiu religio estas

«tradicio, laŭ kiu popolo respondas al la realo, kiun la Sankta Spirito metas antaŭ ĝiaj okuloj.»

La malpli normalaj donacoj de la Spirito, la parolo per lingvoj, la resanigo, la profetado, ne estas necesaj, esencaj aŭ daŭraj, kvankam ili estas mirindaj, spontaneaj kaj, ĉefe, komunaj : la praa eklezio grupiĝis por resanigi, parolis grupiĝinte per lingvoj, ĝiaj profetoj prezidis grupajn Diservojn. Sed pri tiuj donacoj, «ni devas konservi nian senton de mistero.»

«Esti la nova homaro signifas vivi kun aliaj senregule, en la brile respondeca libero kaj vero kiujn ni vidas en Jesuo mem. Kiel ajn ofte la eklezio ŝajnas fuŝi, kiel ajn tia vivo estas riska kaj miskomprenbla, la kristana komunaro devas persisti en tiu Spirita libereco, lernante per siaj eraroj kaj senĉese ĉerpante la pardonon de Dio ... ĉar pardono estas ne finita ago, sed senĉesa fluo de ana akcepto.»

Mi preterpasas multajn trezorojn troveblajn en ĉi tiu libro. Krom teologia sperteco kaj profunda kompreno, la aŭtoro posedas ankaŭ belegan stilon, originalan, koncizan, poezian, plenan de imagpovo. Povi legi la originalan tekston valorus preskaŭ la penon lerni la anglan.

Kathleen Hall, Britio

DIA SPIRITO, NIA PATRINO

La nuna homaro bezonas novan edukon

La plej grava ŝanĝo en nia epoko ŝajne estas, ke la teknika civilizacio ne plu donas al la homoj vivmotivojn. Mondvaste oni formas sciencistojn, matematikistojn, teknikistojn. Filozofio, studado de psikologio, religioj ŝajnas malmulte, se ne tute ne, utilaj.

Kelkaj taksas tiun fakton monda malfeliĉo. Per historio, ili rememoras la antaŭajn jarcentojn, kiam religiaj principoj estis libere kaj ĝoje ricevataj en la familioj mem. La patroj donis ekzemplon de fido. La patrinoj komunikis siajn religiajn konvinkojn samtempe kiel sian lakton. Nenio neniam estas perfekta ; sed tiuj gepatraj spiritaĵoj kaj sociaj donacoj estis altvaloraj.

En nia tempo, kiam progresas al unueco, kiel vasta torento, la tuta homara mondo, la homoj urĝe bezonas homaran kaj altan celon.

La kristanoj devas esti atentemaj, kaj eĉ fariĝi agemaj, ĉar aperas danĝeraj doktrinoj funditaj ne sur Kristo, eĉ ne sur Dio, kaj kiuj pretendas gvidi la nunan kaj morgaŭan homaron. Ni citu nur un inter multaj : La Nova Epoko, inventita en Kalifornio, intencas disvastigi tra

bibliografiaj notoj

Le Nouvel Age. A l'aube de l'Ere du Verseau (La Nova Epoko. Ektagiĝo de la Amfora Epoko) / Jean Vernet. - Téqui, 1990.

New Age : entre nouveauté et redécouverte (New Age, inter novaĝo kaj remalkovro) / Carl-A. Keller. - Genève : Labor et fides, 1990. - (Entrée libre, 12).

Notre vie divine (Nia dia vivo) / A. Lemonnier. - Paris : Cerf, 1936.

vidu ankaŭ

Nenio nova sub la suno / Philippe Cousson, en *Evangeliaj Kajeroj*, 5, 1990, pp. 57-60.

SANKTA SPIRITO, VIRTO - SAINT-ESPRIT, VERTU - HOLY SPIRIT, VIRTUE -
HEILIGEN GEIST, TUGENT - ESPÍRITU SANTO, VIRTUD - SPIRITO SANTO, VIRTU -

la tuta mondo doktrinon bazitan sur la zodiaka signo de la Amforo. Tiu movado ne estas facile difinebla. Ĝi ne estas religio, nek filozofio, nek scienco. Por iom precizigi ĝian konsiston, ni povas atentigi pri ĝiaj fondaj pilieroj :

- 1) scienca substrato : la ideoj de la atimista fizikisto Pitjof Capra [kapra] ;
- 2) la orientaj religioj ;
- 3) kelkaj elementoj de la psikologio de C.A. Jung ;
- 4) astrologio, kaj la antaŭdiroj de horoskopoj.

Sed fronte al tiuj grandiozaj perspektivoj, la homo ankoraŭ sola restas por determini la tragikajn liniojn de sia persona vivmaniero. Al li mankas atenta kaj ĉiutaga edukisto, tiel informita kiel amanta. Kie lin trovi ?

Nia altkompetenta, amanta kaj ĉiutaga edukisto

Ĝis nun, kiel sufiĉe fidela katoliko, mi kredis ke mi havas atentan spiritan patrinon : la virgulinon Maria, patrino de Jesuo la Savanto kaj de la homoj liaj savitoj. Tio estas prava, sed ne sufiĉa. Ni devas ĝin kompletigi : la Virgulino estanta nur kreitino de Dio, ni devas al Li atribui la fonton kaj superan realecon de ĉiuj valoroj kaj agadoj de la Virgulino.

Ni proklamas ke Dio estas esence unu, ke Li estas persone tri : la Patro, la Filo kaj la Sankta Spirito. Alidirite ni nomas ilin : la Kreinto, la Verbo (Vorto, Logoso) kaj la Parakleto ; la Amo. Tiu ĉi senfina Amo, kiu eterne unuigas la Patron kaj la Filon, montriĝas la unua kaj perfekta patrina amo de ĉiuj kreitoj :

«Tamen kiam venos li, la Spirito de la vero, li gvidos vin en ĉian veron» (Joh 16:13).

La agadmaniero de la Sankta Spirito en niaj vivoj estas sufiĉe facila por precizigi. Kiel kristanoj, ni praktikas tri diocelajn virtojn kaj kvar moralajn : fidon, esperon kaj karitaton (amon) ; singardemon, justecon, forton kaj moderecon.

La duobla maniero spirite vivi manifestiĝas en la praktikado de la sep kristanaj ĉefvirtoj kaj de la korelativaj donacoj. Ni klare vidu la

diferencon inter la du modoj de agado : per la virtoj, ni havas grandan parton de aktiveco kaj ni povas ekzerci tiu aktivecon kiel ni deziras, laŭ niaj personaj agmanieroj. La donacoj de la Sankta Spirito estas en niaj animoj kvazaŭ flekseblecoj, kiuj helpas nin alvoki, facile ricevi kaj libermove sekvi la Diajn instinktojn, kiuj transire helpas nin.

Tiu duobla maniero spirite vivi klare manifestiĝas en la detala praktiko de la sep ĉefvirtoj kaj de la sep donacoj :

La fido

La unua diocela virto estas intelekta virto. Per ĝi homoj povas pli kaj pli profunde koni Dion. La ofta studado de la inspirita Parolo kaj la atenta legado de la paroloj de sanktaj homoj lumigas nin.

La donaco de inteligenteco tiel klarigas nian menson ke ni ricevas, eĉ en tiu ĉi vivo, kvazaŭ antaŭguston de la granda revelacio de la ĉielo. Kiel skribas la amanta apostolo Johano, citante Jesuon Kriston :

«La Parakleto, la Sankta Spirito kiun la Patro sendas en mia nomo, instruos vin pri ĉio kaj vin memorigos pri ĉio kion mi diris al vi» (4:26).

La espero

Pri la praktiko de la virto espero, tiel evidenta estas la patrina helpo de la Sankta Spirito : Paŭlo diras :

«La espero ne hontigas, ĉar la amo de Dio estas verŝita en niajn korojn per la Sankta Spirito donita al ni» (Rom 5:5).

Normale estas, ke la Spirito helpu nin, malfortajn infanojn de Dio, bone uzi la esencan virton de la diajn infanojn, la «malgrandan virton esperon», kiun kantis Péguy [pegi]. Ĝi estas ŝajne malgranda ; sed vere grava, ĉar ĝi kondukas la du aliajn al estonteco.

Per la donaco de scienco, la Spirito helpas nin distingi la voloron de la variaj skoloj de penso kaj agadi laŭ la konstruota Regno de Dio kaj de la adoptita homaro !

La amo

Tio estas la ĉefa kristana virto. Ĉar Dio ne estas iu diktatoro ; sed Patro. Esence, patro amas kaj deziras esti amata. Religio, ĉiu religio, estas la prektika socia komunio de amo inter la Kreinto kaj la kreitoj. Tiu religio, kiu estas diversaspekta : kontemplado, servo, apostolado, pacagado, ktp., estas esence inspirata de la virto de Amo.

Sed ĉiu konsentas ke la tuta amo al Dio senfina kaj al la multnombra kaj multaspekta homaro ne estas facila. Por tio helpas nin la Spirito :

«Tiel same la Spirito ankaŭ helpas nian malfortecon ; ĉar ni ne scias, kiel preĝi dece ; sed la Spirito mem propetas por ni per ĝemoj neeldireblaj ; kaj Tiu kiu esploras la korojn scias, kio estas la penso de la Spirito, ĉar li propetas por la sanktuloj laŭ la volo de Dio» (Rom 8:26-27).

La moralaj virtoj

Ĉiuj praktikaj agadoj de nia kristana vivo estas konsekvencoj de la tri diocelaj virtoj, kiuj ligas nin al la tri diaj personoj. Tiu ĉiutaga praktika vivo estas kristane regata de la kvar moralaj virtoj : prudento, forto, justeco kaj modereco.

Per kvar apartaj donacoj, la Sankta Spirito helpas nin pli facile, kaj pli profunde esti feliĉe kondukitaj en la praktikado de nia vivo, kiel adoptitaj gefiloj de la Tre-Alta, kaj kunkonstruantoj de la Regno. Tiuj ĉi donacoj nomiĝas : konsilo, forto, pieco kaj timo ofendi nian Dian Patron.

Tiuj sepaspektaj helpoj de la Spirito en nia vivo similas la tiel diversajn asistadojn de ĉiu amata patrino al ŝiaj infanoj. La dia Spirito vere ludas la rolon de nia supera kaj mirinda Patrino.

Lasta kaj grava demando : Ĉu la akceptado de tiaj multaspektaj helpoj de la Spirito en nia ĉiutaga religia vivo ne forigas aŭ almenaŭ malpliigas la liberecon kaj konsekvence la valoron de niaj agadoj ? Kontraŭe, ni havas la altan meriton tutlibere peti kaj konsenti la interagojn de Dio mem !

Louis Bourdon o.p., Francio

Louis BOURDON [burdɔ], franca dominikano, tre aktiva en la esperantista movado, ĉu katolika, ĉu ĝenerala. Jam verkis por *Evangeliaj Kajeroj* (n-ro 3).

LA DONACITA SPIRITO

El la ĉielo, Jesuo, la Filo de Dio venis al la tero, por instrui al la homaro la vojon al monda paco, feliĉo kaj prospero. Sed pli grave, Jesuo Kristo venis revelacii la vojon por ricevi la Dian donacon de eterna vivo. Li venis por fari la multvaloran donacon de la Sankta Spirito, havebla al tiuj, kiujn Dio vokas al pento.

Jesuo instruis, ke se ni ne ricevas la Spiriton de Dio, ni neniam povas eniri la Regnon de Dio. Kial? Ĉar nur per Dia Spirito ni povas disvolvi la perfektan, sanktan kaj justan karakteron de Dio en ĉi tiu vivo, kaj releviĝi al glora eterna vivo en la Dia familio, ĉe la reveno de Kristo.

Jesuo Kristo promesas specialan helpon al ni, ĉar la Sankta Spirito instruas nin. La Sankta Spirito transdonas povon por laboro.

Tial la spiritaĵoj kaj estaĵoj ŝajnas realon, kvankam la spirita mondo estas nevidebla, ne distingebla per iu ajn de la kvin sensoj.

La Sankta Spirito estas ne tria persono de unuiginta "triunuo". Ni malkovris ke la Spirito de Dio estas la potenco, la povo kaj energio de la Dia familio, ankaŭ la vera naturo, vivo kaj menso de Dio, ne alia spirita estaĵo.

La Sankta Spirito estas bona, pura kaj perfekta konsolanto de Dio. Ni ricevas ĝin per preĝo, laboro, fido, amo kaj espero en Kristo.

Godwin S. Oboh, Niĝerio

LA SANKTA SPIRITO LAŬ LA PROMESO DE JESUO KRISTO

La Parakleto

En la Esperanto-eldono de la Biblio, oni ne tradukis la vorton, per kiu Jesuo parolis pri la Sankta Spirito, oni esperantigis ĝin : **La Parakleto**. Martin Luther germanigis tiun nomiĝon per "der Tröster" (la konsolanto). Alia tradukisto diris : "la apuden vokanto", spirito kiu vokas la unuopan homon el la amaso por donaci al li kaj taskon kaj la aŭtoritaton adekvatan al la donita tasko. En 1 Kor 14 la apostolo Paŭlo multon raportas, pri kio estas donata per la Parakleto.

Tiuj donaĵoj multe rilatas la uzadon de la Evangelio en la komunumoj, en la Eklezio. El ili ankaŭ kreskis tradicioj kaj teologioj, kiuj influis la komprenon de la Evangelio, sed kompreneble, tiuj eldiroj rajtas esti nomataj "kristanaj" nur laŭ la mezuro de iliaj laŭeco aŭ/kaj harmonio kun vortoj kaj agoj de Kristo. Tial bonas kompari ĉion kun la vortoj de Kristo, kiel ili troviĝas, ĉefe en la Evangelio laŭ Johano.

La Sanktan Spiriton, la Parakleton, kiu nin flankenvokas, kiu per siaj donacoj nin kapabligas servi en la anaro de Kristo, tiun Spiriton Sanktan ni rajtas ami. Al ĉiu li donacas alimaniere aŭ alion, sed ĉiun li per tio valorigas kaj estigas personecon pli-malpli memstaran inter la aliaj kristanoj per servado laŭ la Evangelio.

Sankta

Kristo tiun Spiriton nomas sankta, kaj tiun vorton ni jam trovas en la Malnova Testamento. Sanktaj tie nomiĝis aĵoj, kiujn oni uzis dum la templaj Diservoj. Tiuj Diservoj tiam simbole montris la vojon de la homoj laŭ Dia volo, ke ili fariĝu bildoj de Dio (Gen 1:26) ; la vojo ankoraŭ ne finiĝis, ĉar ni similas al Dio ankoraŭ nek laŭpove, nek morale, nek alimaniere.

Li nomiĝis sankta : sanktuloj estas tiuj, kiuj akceptis ke Li fariĝu

SANKTA SPIRITO - SAINT-ESPRIT - HOLY SPIRIT - HEILIGEN GEIST - ESPIRITU SANTO - SPIRITO SANTO -

ilia vivenhavo. Ili penas Liapene, ke ĉio propra estu sub la Sankta Spirito (Lev 19:2), por vivi do sankte, kiel Li estas sankta.

Por agi

Kiel ajn kreita kaj donita, ĉio estas destinita por iel servi, kaj por malhelpi egoismon. Kie la Sankta Spirito regas, la homo ne povas resti senmova, kaj kiel homo agas tiel li rikoltos laŭsene (Gal 6:7). Sed ankaŭ ne-ago estas semado de manko. Krome ĉiu sinteno vokas samon de aliaj, ĉiu egoismaĵo en iu vivo renkontas sin mem per ago de alia : kaj la homo juĝas pri tiu renkonto. Tiel la karaktero de ĉio estas juĝata ; baze ĉiu homo juĝas pri siaj propraj agoj, pri si mem (kp. Mat 12:37). Tiel per la agemo kreita de la Sankta Spirito ni trovos juĝon pri bono kaj malbono, juĝon elspertan.

Jen sperto ebla al ĉiu : ju pli ni agos laŭ la fido al Kristo, laŭ Gal 6:2, des pli proksima tiu nia Sinjoro estas al nia konscio. Kiam en nova eono, renovigita homaro celas ĉiel servi nur laŭ Kristo, tiam ni vidos Lian vizaĝon (Apo 22:1-4). Kristo neniel altrudas sin aŭ siajn benaĵojn : dum oni daŭre persintene kaj perage adoras sin mem kaj la propran vojon, ekzemple en tiel nomata memrealigo, Kristo ne estas en nia vivo, nek videbla nek sentebla. Justeco lin tiam kaŝas laŭ Joh 16:10.

«Kaj rilate juĝon, ĉar la estro de tiu ĉi mondo estas juĝita»
(v. 11)

indikas, ke la fizika mondo havas estron kaj ke tiu estro misestris. Kie ajn la Sankta Spirito kaŭzas agadon, tie pruviĝas la mondo kulpa, ĉar la egoismo eliranta el la "estro de la mondo" kaŭzas suferojn.

Egoismo

Depost la tempo, kiam ni lernis prilabori la teron, al nia vojo apartenas la tasko malligiĝi je egoismo, je la mema propra vojo. La memeco estas la peko (Jes 53:6). Per ĝojoj kaj malĝojoj, per instruoj kaj Diservoj, per donacoj kaj oferpostulo, per laŭdoj kaj punoj Dio penis anstataŭigi la egoismon per donemo kaj helpemo. Sur sin prenante la kulpon de egoismaj sintenoj homaj, Kristo en Dio sin faris ilo de l'Dia servo (Diservo) inter la sanktaj iloj de la templo.

Se ni erarvagas laŭ propra vojo (Jes 53:6), ni tiam fidus nekkje Dio nek je Kristo, sed je ni mem. Nia egoismo tiel faris, ke ni igis aliajn porti por ni, dum laŭ Dio ni portu por la aliaj (Gal 6:2), laŭ la vojo de Kristo (Joh 16:8-9). Neeviteble poste, nia memrilateco kreas kulpon kaj suferon. Ĝis la Sankta Spirito povos pruvi al ni la misvojon.

Gvido

Alian aspekton montras Joh 10:1-10, kie Jesuo klarigas la malsimilecon inter la paŝtisto kaj la ŝtelisto de la ŝafoj: la ŝtelisto buĉas dum la paŝtisto kondukas al vivo (Joh 10:10); li ja ankaŭ preĝigas pri pano sed ne pri viando (Mat 6:11; Luko 11:3). Trifoje Kristo diras, ke li gvidas aŭ kondukas per sia voĉo (Joh 10:3-4, 16) kaj en Joh 16:13 ni legas, ke estas la Spirito, kiu nin gvidas en ĉiun veron. Oni tial konkludis, ke la Sankta Spirito estas la voĉo de Kristo.

Krome laŭ 1 Kor 12 la Sankta Spirito multon donacas por fari je la bono de la Eklezio, kaj la kvar evangelioj enhavas 17 versiklojn, per kiuj Kristo postulas agadon, faradon je la bono de aliaj. Sekve oni ankaŭ povas diri, ke en la Sankta Spirito montriĝas la aktiviga graco de Kristo (1 Kor 15:9-10).

Liberigo kaj estrateco

La Sankta Spirito nin igas esti filoj de la la Kreinto (Rom 8:11-14), kaj ni ĉagrenigus tiun Spiriton, se ni ne kondutis deĉe (Efe 4:30-32; 1 Kor 6:19; kp. Fil 4:8). Per la Sankta Spirito ni transdonas al Kristo ĉion, kio el ni iam faris sklavojn de la mondestro; la maldececo estis esprimo de nia egoismo, el kiu Kristo kaj la Sankta Spirito nin liberigis, por respeguli lian bildon "de gloro al gloro" (2 Kor 3:17-18; Gen 1:27).

Kaj ni havas la promeson de Kristo, ke ankaŭ dum kontraŭagoj fare de aliaj homoj, la Sankta Spirito inspiras al ni, kion diri (Mar 13:11; Joh 14:26). Ni rajtas peti Dion pri la Sankta Spirito, kaj por ni (Luko 11:13), kaj por aliaj (Agoj 8:15-17). Sed neniam la Sankta Spirito estas donata kiel servisto aŭ sklavo; ni devas konsenti, ke tiu Dia Spirito nin estras.

Ni ne povas fizike pruvi la ĉeeston de Kristo aŭ de la Sankta Spirito, ... nekredantoj eble ridas pri ambaŭ. Sed se iu konscie malfermiĝas por spiritaĵoj, tiu povas peti kaj sperti lin ĉirkaŭanta kaj fortiganta kaj interne paciganta. Se iun estras Kristo kaj la Sankta Spirito, tiu homo estas vere libera (Joh 8:36).

Kaj se Kristo iun liberigis, tiu homo ne plu sklavos al tradicio, sed liaj predikoj estas pravigataj per la vortoj de Kristo. La Sankta Spirito elprenas el la vortoj de Kristo kaj pri ili rememorigas (Joh 16:14-15). Prediko laŭ la Sankta Spirito ne povas paroli kontraŭ la vortoj de Kristo sed volas ilin klarigi kaj en ni agigi.

Akompano

En Joh 14:16 Kristo diras, ke la Parakleto restadu kun ni por ĉiam, nin do akompanu. Aŭ ni akompanu lin. Dio ĉion en la mondo aranĝis cele : Kristo kaj la **Patro** ne sendis la Sanktan Spiriton sencele ! Ĉiuj vortoj de Kristo montras la Sanktan Spiriton aktiva kaj aktiviga, same tia lin montras la adiaŭaj vortoj de apostolo Paŭlo en 2 Kor 13:14.

En ni ĉiuj estu la graco, la spirita sango, kiu Kriston venigis teren por savi.

En ni ĉiuj estu la amo de la **Patro**, per kiu ni Liaj fariĝu similaj bildoj (1 Joh 3:2 ; Gen 1:26).

Kaj en ni ĉiuj estu la volo de la Sankta Spirito, aliĝi kaj aliigi, plibonigi ĉion por voĝigi al la graco de Kristo kaj al la amo de la **Patro** (Rom 8:16). Tiu volo igu nin esti kunuloj trans ĉiuj limoj.

Do, la Sankta Spirito, promesita de Kristo, voĝigu por la tuta homaro al vera kunuleco (2 Kor 13:14).

(NDLR : mi ne plu scias kiu verkis)

PETEGO Nuntempa pri la Sankta Spirito

1969-05-26

Eklernu ni hodiaŭ ĉi tiun preĝon : el la kvar ventoj venu, ho Spirito, kaj ekblovu sur ĉi tiujn (...) por ke ili reviviĝu !
(Jeĥ 37:9 b)

Kial gravas kaj estas bezonata tiu preĝo ?

Pro la situacio de la moderna homo ! En la profetaĵo ni legis pri mortigitoj, pri ostoj, kiuj kuŝas sur la ebenaĵo. Terura vidaĵo tio estis. Kaj en la epoko ni vidas, ke la homaro vivas fremdiĝe. Kvankam ni klopodas, por ke estu inter ni amikeco, por ke ni havu respondecon unu pri la alia, por ke ni ekkomprenu unu la alian, tamen la vivo alian bildon montras. Disiĝas la homaro, fremdiĝas la homaro. La sorto de la alia homo ofte ne estas nia afero. Ofte ne koncernas nin, kiu la alian suferigas.

Ni havas konferencojn, ni aranĝas internaciajn kunvenojn, mondorganizacioj pritraktas la aferojn de la homaro, sed okazas malmulto, preskaŭ nenio. Timiga kaj danĝera estas la vivo de la nuntempa homaro, la sorto de nia epoko. Suferas, oni povas diri, la tuta mondo, je nervozeco. Kaj tion ne povas ŝanĝi tiu ĉi fakto, ke troviĝas, dank'al Dio, ankaŭ sanaj homoj, ankaŭ helpemaj homoj, kiuj klopodas helpi al la mondo !

[...]

Kio faras ĉi tiun preĝon promesdona ?

Nepre ni devas respondi al tiu demando, ĉar la homoj kutime demandadas : "Ĉu vi havas ian garantion ? Ĉu ne estas tute sensenca la preĝado pri la helpo de la Sankta Spirito ?"

SANKTA SPIRITO, PREĜO - SAINT-ESPRIT, PRIERE - HOLY SPIRIT,
PRAYER - HEILIGEN GEIST, GEBET - ESPÍRITU SANTO, ORACIÓN -
SPIRITO SANTO, PREGHIERA -

Laŭte sonas la respondo : Havas sencon la preĝado, ne estas senutila la espero, ĉar, jen hodiaŭ ni festas Pentekoston ! Ek de la unua Pentekosto ni scias, ke estas, ekzistas la Sankta Spirito ! Ni povas rigardi liajn farojn, la konsekvencojn de lia alveno ! Ni povas mencii la mirindan tagon, dum kiu tri mil personoj renaskiĝis per la Sankta Spirito ! Kaj la elversado de la Spirito ne ĉesis tiam ! La miraklo de Pentekosto estas ripetebla, eĉ deziras ripetiĝi !

Ĉu ni forgesis jam la venkoplunan predikon de la apostolo Petro, kiu bone komprenis, kio okazis ? Li povis fidi je la promesoj de la profetoj, ĉar ne la profetoj, kiel homoj, faris la promesojn, sed mem la poreterne vivanta, majestoplena Dio ! Kaj Li ne mensogas ! Li plenumas siajn promesojn ! Tion pruvas Pentekosto !

Kaj nun, hodiaŭ, tiu fakto, ke la apostolo Petro ne la profetaĵon de Jeĥezkel citas, entute ne malfortigas la verecon de la promeso ! Li citis dum la unua Pentekosto la profeton Joel, ĉar ankaŭ en la profetaĵo de Joel troviĝas promeso pri la Sankta Spirito !

Ni povas hodiaŭ ĝojegi, ĉar la Eternulo plenumis Siajn promesojn, kaj ni rajtas fidi, forte, kuraĝe, senhezite, ke Li plenumos ĉiujn Siajn promesojn ! Pro tio ni preĝu kun Jeĥezkel : «El la kvar ventoj venu, hio Spirito, kaj ekblovu sur tiujn (...) por ke ili reviviĝu !»

Kaj ne nur la atesto de la Sankta Spirito kuraĝigas nin por preĝi tiel, sed ankaŭ niaj propraj spertoj kaj travivaĵoj ! Ĉar, mi esperas, ke ankaŭ inter vi, karaj gefratoj, troviĝas ne malmultaj, kiuj jam travivis la miraklon de Pentekosto ! Ni jam "renkontiĝis" kun la Sankta Spirito, kun lia forto, helpo, beno. Lumigis nin jam ofte la Spirito, instruis nin, kuraĝigis nin, helpis, ho jes, renaskis kaj konvertis al Jesuo.

Kio faros venkanta nian petegon ?

Venkanta faros nian petegon pri la Sankta Spirito nia konvinkiĝo pri la respondeco de la kredantoj. Ĉar ni, la kredantoj, la gefiloj per la Sankta Spirito de Dio, ni estas la respondeculoj ! Ne la mondo, ne la homaro, ne tiuj, kiuj ne kredas, ne fidas je Dio, je Jesuo Kristo ! Kaj ju pli grandan fidon ni havas, des pli granda estas nia respondeco !

Kaj se iu dirus : "Kara frato en Kristo, vi kiu venis ĉi tien de malproksime, vi ja parolis en via prediko pri tiu fakto, ke antaŭ kelkaj jaroj la fama granda mondorganizado de via presbiteriana eklezio jam preĝis pri la Sankta Spirito, kaj kio okazis ? Ĉu ŝanĝiĝis la situacio de la homaro ? Ĉu la kristana eklezio reviviĝis jam ?

Se tion dirus iu el inter vi, mi respondus al li : "Kara frato, la unua paŝo estis ekkompreni, kia grava tasko nia estas la konstanta preĝado pri la Sankta Spirito." Poste mi memorigus vin, ke la disĉiploj de Jesuo devis dum kvardek tagoj preĝi pri la elversado de la Spirito. Ili devis atendi. Ili devis ellerni, ke sen la Spirito ili povas fari nenion ! Ili devis mem konvinkiĝi, ke sen la forto de la Spirito ili estas nur kadavroj sur la ebenaĵo !

Kaj ni, kvankam ni nomiĝas kristanoj, sen la Spirito de la Patro kaj Filo estas nur kadavroj sur la ebenaĵo ! Sed la kadavroj niaj povas reviviĝi ! La kadavrojn la kompatema Dio volas revivigi ! La homaron, nian mondon, niajn ekleziojn, la popolojn volas revivigi la Patro de Jesuo kristo !

Sed... sed... ni devas preĝi, petegi, konstante, persiste.

Ĝis kiam ? Ĝis tiam, kiam alvenos la Spirito !

Pripensu ni, ke en la valo de la kadavroj, tie, kie estis Jeĥezkel, ne de Dio dependis, ĉu reviviĝos aŭ ne la kadavroj ! Estas kredeble, aŭ ne ; tamen tio estas la fakto ! La reviviĝo en la tiama situacio dpendis de Jeĥezkel ! Nur de Jeĥezkel dependis ! Kial ? Tial, ke li devis fidi je la valoro kaj utilo de sia preĝo ! Li povis jesi, aŭ nei la vortojn de Dio ! Li povis obei, aŭ malobei !

Kaj nun, la reviviĝo de la kadavroj, la reviviĝo de la eklezioj, la nova vivo de la homaro dependas de ni, la kredantoj ! Ni devas stari sur la lokon de Jeĥezkel, inter la kadavroj kaj Dio kaj preĝi : «El la kvar ventoj venu, ho Spirito !» Ni devas, anstataŭ la profeto, plenumi la devon de la profetoj ! Ni devas estiĝi persistaj preĝantoj.

Akceptu kun ĝojo kaj obeemo la mesaĝon de Pentekosto, ĉar nia obeo renkontiĝos kun la volo de Dio, kiu deziras ĉion fari nova !

EVANGELIAJ KAJEROJ

Jozsef Lukáts (Hungario)

(prediko en Halmstad, Svedio)

tirita el *Dia Regno*, 1971, 5, majo 1971, pp. 1493-1494.

KOMENTOJ PRI LA PAROLO EN LINGVOJ

Unue mi devas konfesi ke mi neniam parolis en lingvoj, ĝis nun. Sed dum jaroj miĉeestis preĝejojn kaj preĝrondojn, kie la parolo en lingvoj estis ordinara evento. Eble pro tio mi povas klarigi kelkajn aferojn pri la mistera parolo en lingvoj. Mi ne estas teologo ; mi nur diras, kion mi mem vidis kaj aŭdis kaj spertis dum jaroj.

Multaj homoj kiuj ne spertis la parolon en lingvoj multe timas la fenomenon, opinias ke ĝi rilatas al Satano. Multaj aliaj homoj multe sopiras la sperton, ke ili ricevos la eblecon paroli en lingvoj. Pro tio povas okazi, ke seriozaj disputoj okazas inter tiuj homoj kiuj multe timis novajn spertojn kaj tiuj aliaj homoj kiuj aŭ jam spertis ĝin aŭ sopiras baldaŭ sperti la parolon en lingvoj.

Oni povas legi multon en la Biblio pri la fenomeno, kaj ĝenerale ĝi estas tre favora, ekzemple, en la letero de Paŭlo al la Korintanoj (1 Kor 14). Sed necesas, ke ni distingu inter la uzo de la parolo en lingvoj en privataj preĝoj kaj en publikaj preĝoj, kaj Paŭlo klarigis inter la du malsamaj situacioj.

Lingvoj por publikaj preĝoj

Estas tiu ĉi fenomeno, ke tiel multe malkontentigas certajn kristanojn. Ĉar kiam homo parolas laŭte en nekonata lingvo dum Diservo, oni facile maltrankviliĝas. Paŭlo petis ke ĉiam iu devas interpreti la parolon en tiu situacio, aŭ neniu gajnas ion. Certe en ĉiuj preĝejoj kie mi rimarkis la fenomenon, ĉiam iu interpretis la nekonatajn vortojn, kiel la Spirito donis la eblecon. Tion Paŭlo konsilis al la kristanoj en Korinto.

Sed bedaŭrinde la spertoj en mia propra reformita eklezio en suda Anglio ofte okazis. En la jaro 1908 kelkaj homoj en mia reformita paroĥo en Bracknell deziris paroli en lingvoj kiel la Spirito donis la eblecon dum la Diservoj, sed aliaj multe rifuzis tion. Pro tio la "pentekostaj" homoj en la reformita paroĥo devis fondi novan komunumon, kiun oni nomis

PAROLO EN LINGVOJ - PARLER EN LANGUES - SPEAKING IN TONGUES - ZUNGENREDE
- HABLA EN LENGUAS - PARLARE IN LINGUE -

pentekosta eklezio. Tiu apartigo de komunumoj ofte okazis, kie troviĝis homoj kiuj ricevis la bapton en la Sankta Spirito kaj sentis la bezonon laŭdi Dion dum la Diservoj en nekonataj lingvoj. Multaj aliaj komunumoj tamen akceptis la liberecon kiun la parolo en lingvoj donas al la Diservo.

Pli tolerebla laŭ mi estas kiam multaj homoj, espereble la tuta ĉeestantaro en Diservo samtempe laŭdas Dion en lingvoj kiam la langoj estas liberigitaj. Sed homoj kiuj ne povas liberi siajn langojn sentas sin maltrankvilaj, eĉ minacataj. Same ankaŭ se multaj homoj kantas en lingvoj samtempe. Tio certe estas oreľfrapa sono kaj atmosfero, sed la kantado en lingvoj certe estas tre bela, kaj eĉ la aŭskultantoj sentas, ke ili estas pli apudaj al Dio.

Lingvoj por privataj preĝoj

Sendube tiu fenomeno okazis dum la jarcentoj post kiam homoj ricevis specialan bapton en la Sankta Spirito. Multaj homoj nuntempe uzas la donacon. Denove la lango estas liberigita, kaj la ebleco laŭdi Dion, preĝi al Dio, estas multe pli facila. Kiam ni sentas la fortajn dezirojn komuniki kun Dio, niaj ordinara lingvo kaj vortoj ne sufiĉas. La homo kiu parolas al Dio tiamaniere sentas ke ili vere parolis al Dio pri siaj deziroj kaj laŭdoj. Kiam ajn vi ne scias kion preĝi pri iu situacio, do liberigu la langon kaj parolu en libera nekonata lingvo. Laŭ mia sperto, homoj kiuj faras tion en siaj propraj preĝoj, estas multe pli kontentaj pri siaj preĝoj al Dio. Ne tro alte taksu la fenomenon, certe Paŭlo ne faris tion, sed akceptu la eblecon komuniki pli bone kun Dio.

Mervyn C. Jackson (Britio)

Mervyn C. JACKSON [*mervin ĝakson*], anglo (1939), studis fizikon kaj meteologion. Laika predikanto en la Unuiĝinta Reformita Eklezio, li nun profesie instruas en lernejo.

LA SANKTA SPIRITO EN LA ORTODOKSA GREKA LITURGIO

En ĉiu Ortodoksa Greka Dia Liturgio unuiĝas sekrete la ĉielo kun la tero, la surtera tempo kun la eterneco, kaj principe per la mistero de la Dia Eŭkaristio unuiĝas en unu unuiĝo, la homo kun Dio, per la Sankta Spirito. La homo jam vivas, dum la Dia Liturgio, de la estanta vivo unuiĝinta kun Dio kaj antaŭgustas, analoge al sia progreso kaj al sia grado de sia unuiĝo kun la Plejsankta Triunuo, la ĝojon de la Dia Regno (Mat 28:19).

La ortodoksaj* gekristanoj kredas aŭ fidas kaj vivas, ke ĉion kio okazas dum la ceremonio de la Liturgio, estas rezulto de la sekreta influo de la Sankta Spirito. Tial la Liturgio komencas per la preĝo al la Sankta Spirito, kiu estas la jena :

«Reĝo Ĉiela, Konsolanto, Spirito de l'Vero, kiu estas ĉie kaj ĉion plenigas, trezoro de l'bonoj kaj vivdonanto, venu, purigu nin de ĉia malpuraĵo kaj savu, Bonulo, animojn niajn.»

En Ortodoksa Greka Dia Liturgio la Sankta Spirito, de la komenco ĝis la fino, ĉeestas. La fidantaj gekristanoj sentas kaj vivas la fruktojn de la Sankta Spirito (Gal 5:22), unu el la tri personoj de la Plejsankta Triunuo. La Sankta Spirito estas la vivo kaj la animo de la Ortodoksa Greka Dia Liturgio. Tio, kio fariĝas dum la horo de la ceremonio de la Dia Liturgio fariĝas per la sankta forta intermetiĝo de la Sankta Spirito. De tempo al tempo, dum la ceremonio de la Dia Liturgio, la partoprenantoj ripetas la «Sinjoro, kompatu nin».

noto

* (NDLR) Ni tamen provu distingi inter la ĝenerala adjektivo ortodoksa, kiu signifas "en la ĝusta doktrino" kaj la vorto ortodoksio, kiu specife rilatas al la orientaj, grekaj, rusaj kaj similaj eklezioj (kp. *Dia Regno*, 707, julio 1990, p. 4)

SANKTA SPIRITO, LITURGIO, GREKA ORTODOKSIA EKLEZIO - SAINT-ESPRIT, LITURGIE, EGLISE ORTHODOXE GRECQUE - HEILIGEN GEIST, LITURGIE, GRIECHISCHE ORTHODOXE KIRCHE - ESPÍRITU SANTO, LITURGIA, IGLESIA ORTODOXA GRIEGA - SPIRITO SANTO, LITURGIA, CHIESA ORTODOSSA GRECA -

Ni, ortodoksaj gekristanoj, ni kredas aŭ fidas, ke la Sankta Spirito, kiu prezentiĝis multfoje dum la surtera vivo de nia Sinjoro Jesuo Kristo laŭ la Nova Testamento, en la naskiĝo de nia Sinjoro Jesuo Kristo de la Sankta Virgulino Maria, en la baptiĝo de Kristo fare de la Sankta Antaŭvoja Johano, en lia Metamorfozo, en liaj mirakloj, en la sekreta Vespermanĝo kaj en Pentekosto, kiu estas la surtera fondiĝo de lia Eklezio, ĉeestas dum la ceremonio de la Dia Liturgio. Per lia prezentiĝo, la Sankta Spirito dum la Dia Eŭkaristio sanktigas la Diajn donacojn, t.e. la sanktan Karnon kaj la honestan Sangon de nia Sinjoro Jesuo Kristo, el kiuj komunias la gefidantoj, aŭkultante la saman nian Sinjoron dirante per la buŝo de la liturgianta pastro :

«Vere, vere, mi diras al vi : se vi ne manĝas la karnon de la Filo de homo kaj ne trinkas lian sangon, vi ne havas en vi vivon. Kiu manĝas mian karnon kaj trinkas mian sangon, tiu havas eternan vivon ; kaj mi levos tiun en la lasta tago. Ĉar mia karno estas vera manĝaĵo, kaj mia sango estas vera trinkaĵo. Kiu manĝas mian karnon kaj trinkas mian sangon, tiu restas en mi, kaj mi en li.»
(Joh 6:53-56)

La pastro invitas la gekristanojn per la vortoj :

«Per timo de Dio, fido kaj amo alvenu.»

La pastro, kiu liturgias, finas la Dian Liturgion, inter aliaj vortoj, per la jenaj vortoj al la Plejsankta Triunuo :

«Ĉar Ci estas nia sanktigo kaj al Ci la gloron ni suprensendas, al la Patro kaj al la Filo kaj al la Sankta Spirito eterne. Amen.»

Joannis Kotitsas, Greklando

SIMBOLOJ DE LA SANKTA SPIRITO

Laŭ Luko 3:22 «la Sankta Spirito malsupreniris sur lin [Jesuo] en korpa aspekto kiel kolombo». Tial kolombo fariĝis la plej ofta simbolo de la Sankta Spirito. Ĝi estas konata jam de la praeklezio. En kelkaj preĝejoj kolombo estas pendigita super la predikejo por indiki ke la predikanta pastro estu gvidata de la Sankta Spirito. Iam la kolombo portas olivarban folion en sia beko, por memorigi ke la diluvo finiĝis (Gen 8:11). La kolombo ordinare portas nimbon kun aŭ sen disradiantajn radiojn. Tiun nimbon aŭ kolombon sur la kapo aŭ la ŝultro portas en la kristana arto ankaŭ homoj, inspiritaj de la Sankta Spirito.

Kolombo havas ankaŭ aliajn simbolajn signifojn. Ĝi fariĝis simbolo de la paco, ĉar oni kredis, ke galo mankas ĉe la kolomboj, kaj tial ili estas pacemaj. Kolombo sen nimbo simbolas ankaŭ la homan animon.

Ses aŭ sep kolomboj simbolas la donacojn de la Sankta Spirito : laŭ Jes 1:2 : saĝo, prudento, konsilo, forto, sciado kaj timo ; laŭ Apo 5:12 : potenco, riĉo, saĝeco, forto, honoro, gloro kaj laŭdo.

Fajro en brulanta lampo sur la altaro aŭ apud la tabernaklo en Rom-katolikaj kaj en kelkaj aliaj, ekzemple kelkaj svedaj, preĝejoj simbolas la ĉiaman ĉeeston de la Sankta Spirito.

La fajro fariĝis simbolo de la Sankta Spirito pro la pentekosta miraklo :

«Kaj al ili aperis disirantaj langoj kvazaŭ el fajro, kaj sidiĝis sur ĉiun el ili. Kaj ĉiuj pleniĝis de la Sankta Spirito.» (Agoj 2:3-4)

Ankaŭ fajrolangoj sur liturgiaj vestaĵoj kaj aliaj artaĵoj simbole esprimas la ĉeeston de la Sankta Spirito. Iam la fajrolangoj disradias el kolombo aŭ el la mano de Dio. Tiuj simboloj estas bildoj de Pentekosto.

SANKTA SPIRITO, SIMBOLO - SAINT-ESPRIT, SYMBOLE - HOLY SPIRIT, SYMBOL - HEILIGEN GEIST, SINNBILD - ESPÍRITU SANTO, SÍMBOLO - SPIRITO SANTO, SIMBOLO -

La Sankta Spirito en simboloj de la Triunuo

Simboloj de la Sankta Spirito kompreneble aperas ankaŭ en la simboloj de la Triunuo. Triangulo jam en la praeklezio simbolis la Triunuon. En la triangulo la Sankta Spirito estas reprezentata de ne certa flanko. Similaj simboloj estas tri fiŝoj, tri leporoj aŭ tri agloj kurantaj en cirklo.

Korpo kun tri kapoj, aŭ kapo kun tri vizaĝoj aperis kiel simboloj de la Triunuo dum la mezepoko. La papo Urbano 8-a malpermesis tiajn ĉi monstraĵojn.

Ekde la 12-a jarcento aperas bildoj de la trono de graco. La Patro, maljunulo kun barbo kaj krono, tenas krucon kun Kristo. La kolombo de la Sankta Spirito flugas supre, sidas sur la ŝultro de la Patro aŭ sur la kruco. Kvankam homformaj bildoj de la Patro estas malpermesitaj en la ortodoksia eklezio, komencis aperi ikonoj kun la sama motivo.

La plej konata kaj tute laŭregula ortodoksia ikono de la Triunuo tamen estas *La Malnovtestamenta Triunuo*, la tri anĝeloj aŭ viroj, kiuj estis gastoj ĉe Abraham, sed kiuj samtempe estas bildo de la Triunuo.

Aparte interesa ortodoksia simbolo de la Triunuo estas la Patro kun siaj du manoj, kiuj estas la Filo kaj la Sankta Spirito. Mi neniam vidis veran bildon de la Patro kun la manoj. Verŝajne tiu ĉi simbolo estas nur vorta priskribo.

Leif Nordenstorm (Svedio)

Leif NORDENSTORM, svedo, naskiĝis en 1960, diplomigis pri rusa lingvo kaj teologio en la Universitato de Uppsala. Nun li estas pastro en la Sveda Eklezio en Luleå, norda Svedio, kaj libertempe okupiĝas pri la praskandinava religio. Li antaŭe redaktis *Kontakton* kaj nun la svedan *La Esperon*.

LA SPIRITO DE DIO EN LA BIBLIO

Pli ol kvardek libroj mencias la Spiriton. Ekzemple :

Malnova Testamento

Genezo 1:2	La spirito de Dio ŝvebis super la akvo.
Eliro 31:3	Mi plenigis Becalelon per Dia spirito.
Nombroj 24:2	La spirito de Dio venis sur Bileamon.
Readmono 34:9	Josuo estis plena de spirito de saĝeco.
Juĝistoj 6:34	La spirito de la Eternulo venis sur Gideonon.
1 Samuel 16:13	La spirito de la Eternulo ekfavoris Davidon.
2 Samuel 22:23	La spirito de la Eternulo parolas per mi.
1 Reĝoj 18:12	La spirito de la Eternulo forportos vin.
2 Reĝoj 2:16	La spirito de la Eternulo forportis lin.
1 Kroniko 12:18	La spirito venis sur Amasajon.
2 Kroniko 24:20	La spirito de Dio venis sur Zeĥarjan.
Neĥemja 9:20	Vian bonan spiriton vi donis al ili.
Ijob 33:4	La spirito de Dio nin kreis.
Psalmo 139:7	Kien ni iros for de Via spirito ?
Jesaja 11:2	Estos sur li la spirito de la Eternulo.
Jeĥezkel 36:27	Mian spiriton Mi metos en vin.
Daniel 4:18	Vi havas en vi la spiriton.
Joel 2:29	Mi en tiu tempo elverŝos Mian spiriton.
Miĥa 2:7	Ĉu malgrandiĝis la spirito de la Eternulo ?
Ĥagaj 2:5	Mia spirito estas inter vi ; ne timu.
Zeĥarja 4:6	Nur per Mia spirito, diras la Eternulo.

Nova Testamento

Mateo 3:16	Li vidis la Spirito de Dio malsuprenantan.
Marko 1:12	La Spirito pelis lin en la dezerton.
Luko 11:13	Via Patro ĉiela donos la Sanktan Spiriton.
Johano 3:34	Ne laŭmezure Li donas la Spiriton.
Agoj 11:12	La Spirito ordonis, ke mi iru kun ili.
Romanoj 8:26	La Spirito mem propetas por ni.
1 Korintanoj 3:16	En vi loĝas la Spirito de Dio.
2 Korintanoj 3:3	Skribita per la Spirito de Dio.
Galatoj 5:22	La frukto de la Spirito estas amo, ...
Efesanoj 1:13	Vi estas sigelitaj per la Sankta Spirito.
Filipianoj 3:3	Ni, kiuj per la Spirito de Dio adoras.

EVANGELIAJ KAJEROJ

Koloseanoj 1:8	Li sciigis nin pri via amo en la Spirito.
1 Tesalonikanoj 5:19	Ne estingu la Spiriton.
2 Tesalonikanoj 2:13	Savo en la sanktigo de la Spirito.
1 Timoteo 4:1	La Spirito klare diras ke kelkaj defalos.
2 Timoteo 1:7	Dio donis al ni spiriton de amo.
Hebreoj 9:14	Kristo per la eterna Spirito sin oferis.
Jakobo 4:5	La spirito, kiun Li loĝigis en ni.
1 Petro 1:2	En sanktigo de la Spirito, per obeo.
1 Johano 4:2	Jen kiel vi ekkonas la Spiriton de Dio.
Judas 19	Tiuj estas laŭsentaj, na havantaj la Spiriton.
Apokalipso 22:17	La Spirito kaj la fianĉino diras : Venu.

David Featherstone (Britio)

David FEATHERSTONE [dejvid feθestoðn], brito, kiu jam verkis por *Evangeliaj Kajeroj*. Dum dek tri jaroj li preparis studentojn por instrui pri religiaj aferoj en britaj lernejoj. Li estas presbitero en sia evangelika komunumo.

EVANGELIAJ KAJEROJ

LEGI ESPERANTE, BONE !
LEGI SAMTEMPE KRISTANE, EĈ PLI BONE !

Vi nun posedas, aŭ prunteprenis unu ekzempleron de la revuo *Evangeliaj Kajeroj*.

Kristana revuo, kiel *Evangeliaj Kajeroj*, ne oftas, eĉ tiu ĉi estas la unika samspeca.

Ĝi estas kristana, biblia, internacia kaj interkonfesia. Ĝi celas homojn, kiuj volas pripensi sian fidon (aŭ sian vivfilozofion), kaj akceptas aŭskulti la alian. Ĝia nivelo estas kaj sufiĉe simpla kaj sufiĉe altnivela, t.e. nek bagatela, nek pedanta. Ĝi do bone taŭgas por vi.

Revuo tia bezonas minimuman nombron da fidelaj abonantoj. Sed ne. ĉiuj el vi (r)estas abonantoj. Jes, vi bone komprenis. Per tiu paĝo mi celas re-abonojn, subtenojn.

Krome, eblas kompletigi la kolekton per aĉeto de aperintaj numeroj :

1. La Biblio	4,30 XEU
2. Ekologio	4,30 XEU
3. La spirita vivo	5 XEU
4. Komunikado	5 XEU
5. La Regno de Dio	5 XEU
6. Unueco	5 XEU
7. Paco, justeco	5 XEU
8. La Sankta Spirito	5,50 XEU

La prezojn mi indikas en la eŭropa monunuo, ankaŭ dirita ECU. XEU estas la oficiala mallongigo uzata de la bankoj.

Teorie en 1991 aperos : 9. Etiko, kaj 10. La savo.

ABONOJ

Abono por du numeroj : 11 XEU (77 FRF) (XEU estas la banka indiko de la eŭropa monunuo, ankaŭ dirita ECU) Vi nepre indiku ekde kiu numero.

al Philippe Cousson, 26 Rue de Pré Ventenet, 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio.

per poŝta konto, Philippe Cousson, 244 45 X, Limoges, Francio,

aŭ per internacia poŝta mandato en FRF,

aŭ per 16 internaciaj respondkuponoj.

aŭ al Aŭstrio, Heinz Platzer, Brünnerstr. 107-109/2/1, 1210 Wien

öPSK-konto 3675.724, Heinz Platzer

Belgio, Jacques Lemaire, r. des Déportés 100, 6180 Courcelles

konto 001-0405933-64

Britio, Thomas Neil, 82 Glasgow Rd, Kilmarnock, KA3 1UN

national giro, FEBC, 65274 0006

F.R. Germanio, Sr Theotima Rotthaus, 7794 Wald

Sparkasse Meßkirch K-tonummer 9434, BLZ 693 520 60

Irlando, Maire Mullarney, Mill H., Whitechurch Rd, Rathfarnham,

Dublin 14

Israelo, Esperanto Centro, P.O. Box 23 180, 91231 Jerusalem

Italio, Centra Oficejo de IKUE, v. F. Berni 9, 00185 Roma

CCP, Centra Oficejo de IKUE, 23290000

Nederlando, Leen Hordijk, v. Hogendorplaan 4, 3135 CD Vlaardingen

post giro, KELI, 5506132

Svedio, Arne Lundkvist, Skohornbacken 73, 126 39 Hägersten

poŝtgirkonto, Kristliga Esperantoförbundet, 9 14 39-0

Svislando, Lina Reutemann, Iddastr. 34, 9008 St Gallen

poŝta ĉekkonto, KELI svisa sekcio (Z en), 80-52203-8 Zürich

Usono, Cornelius McKown, 460 Orlando Ave., State College, Pa

16803

aŭ al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ

Rotterdam, Nederlando, pere de la konto evka-e.

(vidu en la jarlibro de UEA 1991, ĉe la paĝo 35)

Ni daŭre serĉas perantojn en aliaj landoj.

Vi kompreneble povas donace aboni iun alian, kiu cetere havus problemon por sin aboni.

John Frederic TWILLEY : Spirita vivo - vivo per la Spirito	3
Ernst VENTER : La Sankta Spirito, aparta donacanto	17
Valerijus RUDZINSKAS : La hodiaŭa agado de Kristo en la Sankta Spirito	31
Gerrit BERVELING : Libereco en la nenecesa ...	43
Kathleen HALL : La peranta Dio (Recenzo : <i>The Go-between God</i> / / John V. Taylor)	49
Louis BOURDON : Dia Spirito, nia patrino	53
Godwin S. OBOH : La donacita Spirito	58
[?] : La Sankta Spirito laŭ la promeso de Jesuo Kristo	59
LUKÁTS Jozsef : Petego nuntempe pri la Sankta Spirito	63
Mervyn JACKSON : Komentoj pri la parolo en lingvoj	67
Joannis KOTITSAS : La Sankta Spirito en la ortodoksa greka Liturgio	69
Leif NORDENSTORM : Simboloj de la Sankta Spirito	71
David FEATHERSTONE : La Spirito de Dio en la Biblio	73

prezo : 5,50 XEU (38,50 FRF)